

Novembre 2025 • n-ro 4/2025 (185)



PROGRESIGA REVUO POR LEGANTOJ INTER 10- KAJ 100-JARAĜAJ

EVUO ▲ Teatraĵeto: Sorĉa arbaro. Konversaciaj temoj. Kantu kun Juna Amiko. LUDE. LUME. Legu kaj ĝuu. Esperanto- trafikoj. Komisiono por Virina Agado: Anna Elisa Tuschinski. Granda muzika festivalo en Pollando: Ŝopeno 2025. Interkultura Mondo: Intervjuo kun Esu Peranto. Ekskurso al Tiĉino. LASTE. Krucenigmo.

Kolibrido

Aŭtoro: José Campos Pacheco.
Desegnis: Joel Pernas.





Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Ahmad Reza Mamduhi, IR) 4

Konversaciaj temoj: Tute kutima tago: tri dialogoj

(Judit Felszeghy, HU) 5



Teatraĵeto: Sorĉa-arbaro (José de J. Campos Pacheco, CU kaj Luiza Carol, IS) 8

Kantu kun Juna Amiko:

Abio vi (Julio Csobán, DE, Paul Christaller, DE kaj Małgosia Komarnicka, PL) 12



Historio: Prago kaj ĝia historia allogaĵo: La

Ponto de Karolo (Jerzy Dryja, PL) 14

LUME: El mia kolora vivo – kolorigu la bildon, trovu diferencojn (Pavel Rak, CZ) ... 16



LUDE: Tempo kaj cirkonstancoj saĝon alportas.

(Mónika Molnár, CH); 17

Protektado de bestoj.

Lupo: danĝera por la ŝafoj, sed protektita speco (Renée Triolle, FR) 19



Muzika festivalo: Ŝopeno 2025 – granda muzika festo en Pollando

(Małgosia Komarnicka, PL) 20

Legu librojn – premioj – konkursoj:

Kristnaska donaco. Klubo de bona libro: Kristnaska kanto. Ekkonu skoltismon kaj ĝiajn simbolojn. Novaj eŭroj kun Maria Skłodowska-Curie, ĉu? (Małgosia Komarnicka, Cristina Bollini, PL) 22



Konatiĝu kun Dasipeltis, la ovomanganto

(Luiza Carol, IS) 26

Algoj, valorigenda trezoro. Stulta ideo (Mireille Grosjean, CH) 27



Virina Agado:

Ĉina Esperanto-studentino kaj retkomerca platformo (Karmina, CN) 28



Esperanto-trafiko: Survoje al Esperanto

(Stasia Chylicki, PL) 30

Interkultura

Mondo: Intervjuo kun Esu Peranto (Małgosia Komarnicka, PL) 31



Komisiono por Virina Agado:

Anna Elisa Tuschinski (Małgosia Komarnicka, PL) 34

Ekskurso: Tiĉino

(Mireille Grosjean, PL) 36




LASTE: Rakonto pri du urboj. Unu el la kvar: 12

respondoj. Krucenigmo (Stefan Mac-Gill, NZ/HU, Stano Marček, SK) 37

Bildstrio: Pilĉjo (José de J. Campos Pacheco kaj Sonmy Álvares, CU) 40

Eldonanto de Juna Amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo:** Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj:** Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 173 (1972 ĝis 2022) publike legeblas ĉe: www.eventoj.hu/juna-amiko/. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marceko@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), José de Jesús Campos (Kubo) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo), José de Jesús Campos (Kubo), Raita Pyhälä (Finnlando). Presita en Slovakio. **Administranto:** Hamzeh Shafiee, ilei.officejo@gmail.com. La sekva numero aperos en Februaro 2026. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de Januaro, Aprilo, Aŭgusto kaj Oktobro. **Jarabono:** € 18 en t. n. A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso). Reta varianto: A-lande € 11, B-lande € 7.



Karaj amikoj!

Finiĝas la jaro 2025 – kun la belaj, tradiciaj jarfinaj festotagoj: Kristnasko, ferioj kaj poste Novjaro... – Ni festu ilin kune, ankaŭ kun kaj pere de nia kara *Juna Amiko*!

En la rubriko *Konversaciaj temoj* ni legos kiel saĝe, bele kaj utile organizi niajn tagojn. Sekvos bele ilustrita teatraĵeto *Sorĉa arbaro* kun naskiĝtago de Karlo, desegnanta bildojn per donacitaj peniko, kolorkrajonoj kaj kolorfarboj. En la rubriko *Kantu kun Juna Amiko* ni ornamos abion per diversaj dekoracioj kaj kantos kristnaskan kanton *Abio vi*, sed ankaŭ lernos plani ŝanĝojn en la nova jaro kaj variigoj lecionojn de Esperanto per miaj *Kantoj por kursoj*. En historia rakonto pri la ĉefurbo de Ĉeĥio, Prago, ni konatiĝos kun la *Ponto de Karolo* kaj en la rubriko LUME ni ornamos kristnaskan arbon. En la rubriko LUDE ni kantos kun Kajto, flugos

per flugiloj kiel birdoj, naĝos per naĝiloj kiel fiŝoj, veturos kun du knabetoj per aŭtobuso kun testudo kaj kiel astronautoj vizitos per rakedo lunon kaj kosmon. Ni ankaŭ lernos kiel protekti lupon kaj aliajn bestojn kaj vizitos muzikan konkurson de Frederiko Ŝopeno en Pollando.

En *Legu kaj ĝuu!* ni legos pri Kristnaska donaco, Kristnaska kanto, skoltismo kaj pri novaj eŭroj kun Maria Skłodowska-Curie.

En la rubriko *Naturo* ni ekkonos serpenton, kiu manĝas ovojn kaj la mirindajn marherbojn algojn. En *Virina Agado* ni ekkonos agadon de ĉina Esperanto-studentino. Sekvos *Esperanto-trafiko*, *Interkultura Mondo* pri artefarita intelekto, *Komisiono por Virina Agado* pri Anna Elisa Tuschinski, ekskurso al Tiĉino kaj la rubriko *LASTE*, kun *Rakonto pri du urboj* kaj kvizo “Unu el la kvar” donos al vi 12 respondojn kaj “cerban gimnastikon” – Krucenigmon.

Agrablan legadon de nia revuo *Juna Amiko* kaj belajn jarfinajn festojn deziras al vi via redaktoro,
Stano Marček

Karaj legantoj,

Kun ĝojo mi turnas min al vi en la fino de jaro plena je inspiro, teknologiaj novigoj kaj novaj esperoj por nia komunumo.

En ĉi tiu numero vi trovos ne nur rakontojn, ludojn kaj kantojn, sed ankaŭ multajn materialojn, kiuj invitas nin pensi pri la estonteco de Esperanto kaj pri la rolo de artefarita intelekto en nia mondo.


Ĉiam pli ofte ni renkontas pri-Esperantajn enhavojn, kreitajn per inteligentaj iloj – de interaktivaj kursoj ĝis voĉaj legiloj, kiuj helpas ankaŭ nevidantajn legantojn ĝui la belecon de nia lingvo. Ĉi tio montras, ke teknologio, se gvidata de homa saĝo kaj koro, povas servi al edukado, paco kaj kultura interkompreno – la samaj celoj, kiuj gvidas ILEI kaj ĝian revuon *Juna Amiko*.

Tiu ĉi jaro alportis ankaŭ gravajn paŝojn por nia movado sur la internacia scenejo. Dum la 43-a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Samarkando, nia samideanino **Mireille Grosjean** brile reprezentis nin, proponante du historiajn iniciatojn: ke **la 26-a de Julio fariĝu la Monda Tago de Esperanto**, kaj ke **Esperanto estu enmetita en la liston de la nemateriaj kulturaj heredaĵoj de Unesko**. Ŝia kuraĝa voĉo memorigis la mondan publikon, ke Esperanto restas vivanta kultura trezoro – lingvo de komunikado, paco kaj justeco.

Ŝia prezentado spekteblas en:
youtube.com/watch?v=f2bvr_7711Y

Ni esperas, ke ĉi tiu numero inspiros vin ne nur legi, lerni kaj ludi, sed ankaŭ pensi, kiel ĉiu el ni povas kontribui al pli justa kaj interkomprenema mondo – per la forto de vortoj, koro kaj scienco. Agrablan legadon kaj klerigan finon de la jaro deziras al vi

Ahmad Reza Mamduhi, Prez. de ILEI



Tute kutima tago: tri dialogoj

Help-materialo por ekzamenotoj. Rubrikestro: Judit Felszeghi

I. Matene, dumvoje al la laborejo

Inter mi, Flora (F),
kaj mia najbaro, Luĉjo (L).

F: – Saluton! Kia bonŝanco, ke vi ekvidis min en la bushaltejo! Se vi nun ne veturigus min al mia laborejo, mi certe malfruus. Mi maltrafis la pli fruan aŭtobuson, kaj mi atendis jam de pli ol kvin minutoj.

L: – Mi ĝojas, se mi povis helpi vin, kara najbarino! La enurba trafiko estas terura nuntempe. Oni devas ĉiam kalkuli je neatenditaj okazoj, kaj ekiri kvin – dek minutojn pli frue. Eble pli frue ellitiĝi.

F: – Ne eblas, Luĉjo! Mi ellitiĝas je la kvina!

L: – Nekredeble! Tiel frue! Vi povus eĉ piede iri ĝis via laborloko dum tiuj du

horoj. Aŭ ĉu vi manĝas tutan porkon matene, dum unu horo?

F: – Mi? Eĉ preskaŭ neniom! Mi trinkas nur lakto-kafon kaj mi enbuŝigas eble biskviton. Sed mi devas iri kun mia hundo eksteren... Kaj foje tio daŭras dekkvin minutojn.

L: – Eĉ tiel restas multe da tempo...

F: – Mi ŝatas senurĝe elekti por mi la vestaĵon, ŝminki min... Hodiaŭ mi ne trovis la ŝuojn, fine mi retrovis ilin sur la balkono, malpuraj... kaj mi devis purigi ilin... sed mi ne trovis la broson por la ŝuoj.

L: – Kaj kie ĝi estis?

F: – Vi ne povus diveni tion: en la fridujo...

L: – ?

F: – En la fridujo estis iu obstina makulo, ĉar eble jogurto, aŭ io tia elverŝiĝis, kaj mi volis purigi ĝin, sed ne sukcesis. Do – nun mi forigis la sekiĝantan makulon, sed poste mi devis lavi la broson... La broso fariĝis malseka, kaj tiel la ŝuojn mi ne povis purigi per ĝi. Mi do devis trovi ion taŭgan por la purigado...

L: – Belaj ŝuoj! Kaj vi bone purigis ilin!


F: – Ja jes – sed ili ne tiuj estas! Mi poste ŝanĝis la ideon, kaj decidis surmeti aliajn ŝuojn...

II. Dumtage

Inter mi, Flora (F)
kaj mia amikino, Lumina (L).

L: – Saluton Flora, mi ricevis prunte bonegan filmon, en kompakta disko, ni povos spekti ĝin hodiaŭ vespere. Postmorgaŭ mi jam devos redoni ĝin.





F: – Saluton amikino! Mi dankas, sed mi entute ne havos tempon hodiaŭ vespere! Vi ja scias, ke mi lernas Esperanton, kaj ĝuste hodiaŭ estos leciono.

L: – Ĉu dum la tuta vespero?


F: – Pli-malpli jes. Post la laboro mi devos iom trarigardi la novajn vortojn kaj la gramatikaĵon. Por tio, mi kutime sidas en mem-serva kafejo, kaj dum mi trinkas kafon kaj manĝas ion, mi klopodas okupiĝi iomete pri la aktuala materialo. La kurso komenciĝas je la sepa vespere, kaj ĝis tiam mi havas eĉ ne du horojn...

L: – Mi povos atendi vin post la kurso, mi veturigis vin hejmen, kaj ni kune spektos la filmon ĉe vi.

F: – Ho kara, la kurso finiĝas je la oka kaj duono! Kaj hejme mi devos ankoraŭ lavi miajn subvestaĵojn, ordigi la kuirejon, gladi mian sekvontagan ĉemizeton. Mi eble ankoraŭ enrigardos la televidan programon, dum gladado, kaj poste mi devos sidiĝi apud la komputilo...

L: – Kion vi faras komputile tiel malfrue?

F: – Hodiaŭ ekzemple mi ĝiros la pagotan sumon pro la elektro al la provizanto. Krome mi legas ankaŭ la novaĵojn rete, kaj miajn leterojn alvenintajn. Tio ja daŭras sufiĉe longe, ĉar se dume mi ekvidas iun interesan novaĵon aŭ blogon, mi komencas legi ĝin. Mi ĝojas, se mi pretos ĉirkaŭ noktomezo, sed ofte eĉ post la unua. Poste mi ankoraŭ duŝos min, lavos la dentojn, kaj mi jam dormanta grimpos en la liton... Je kioma? Mi eĉ la horloĝon ne jam rigardas!



III. En mia laborejo

Kun mia kolego, Stefano (S)

(je la 9-a matene).

S: – Saluton Flora! Pardonu pro la ĝeno, sed vi kuraĝigis min, ke mi povas iam ajn senhezite turni min al vi, kiam mi bezonas helpon.

F: – Mem-kompreneble Stefano! Mi jam de jaroj laboras ĉi tie, kaj kutime mi helpas la novajn kolegojn. Demandu min tute trankvile!

S: – Ho, vi estas afabla! Jen mia protokolo pri la lasta labor-kunsido... ĝi estas entute nur 4-paĝa... ĉu vi bonvolus legi kaj eventuale korekti ĝin, laŭnecese?

F: – Bone, volonte...

Mi nun estas ankoraŭ okupata pri la bilanco... Sed, dum la antaŭtagmezo mi iros al vi por preni la protokolon.

(tagmeze)

S: – Flora, mi volas nur demandi, ĉu eble vi ne forgesis pri mia

protokolo?


F: – Kio? Ah, la protokolo! Tute ne, sed mi ankoraŭ ne trovis la tempon por tio, iu kliento retenis min dum pli ol unu horo, kaj mi eĉ mian taskon ne povis ankoraŭ fini. Sed, ĉu vi scias, ni iru kune lunĉi, kaj dume mi legos ĝin!

(en la manĝejo)

F: – Rigardu Stefano, tie sidas niaj gekolegoj! Ni sidiĝu al ilia tablo, ni povos iom babili dum manĝado!

(post lunĉo)

F: – Stefano, mi volas ankoraŭ kuri al la apuda vendejo por aĉeti ion por vespermanĝo... vi nur reiru al la kontoro, mi venos baldaŭ!



S: – Jes, jes... sed... la protokolo... Mi ja kunportis ĝin!

F: – Ho, vere! Do, reveninte el la vendejo mi pasos ĉe vi, kaj ni rigardos ĝin!

(posttagmeze)

S: – Flora, pardonu, mi ne volas ĝeni vin, sed jam baldaŭ finiĝos la labortago...

F: – Mi ja ne forgesis pri via protokolo! Sed, ni trarigardos ĝin morgaŭ. Nun mi devas fini tiun ĉi leteron, kiun la ĉefo donis al mi.

S: – Morgaŭ jam matene mi devos doni ĝin al la komitato.

F: – Mi ne komprenas, Stefano, kial en la lasta minuto vi avertas min pri tio! Do, ni vidu tiun protokolon!

(eksonoras telefono)

F: – Halo, jes, estas mi. Kiu? Saluton Lumina! En la laborejo, jes. Kiam? Nun? Jes, volonte! Atendu min ĉi tie, ĉe la enirejo de mia laborloko, mi venos post kvin minutoj!



Taskoj:

1. Vicigu, kion faras Flora matene, vespere kaj en la laborejo!
2. Vicigu, kiuj iloj kaj objektoj estas bezonataj a) en la banĉambro, b) por prepari matenmanĝon, c) sur via laboreja skribotablo!
3. Rakontu la tagon de Flora – tamen ne uzu dialogon! Provu fari tion sen rigardi la tekston!
4. Rakontu unu tagon de Flora, uzante pasintan tempon!
5. Kia estas via tago? Rakontu (skribu), kion vi faras kutime, dum kiom da tempo!
6. Imagu, ke vi estas la amikino de Flora, kaj diru (skribu) al ŝi, kiel ŝi povas dividi

sian tagon pli racie. Kiujn laborojn ŝi devus kaj kiujn ŝi ne devus fari – aparte, en la hejmo matene, en la laborloko kaj post la laboro!

7. Verku dialogon inter Flora kaj ŝia ĉefo, kiam Flora alvenas al sia laborloko sufiĉe malfrue!

8. Imagu, kia estas la semajnfino de Flora, kaj rakontu pri tio!

Vortklarigoj

Biskvito: Simpla bakaĵo, dufoje aŭ longe bakita, por povi longe konservi ĝin.

Ŝminki: Farbi, kolorigi, plibeligi vizaĝon per farbo aŭ per kosmetikajoj.

Obstina: firme restanta ĉe sia propra opinio aŭ volo, malgraŭ ĉiaj kontraŭaj admonoj.

Jogurto: Lakto acidigita per speciala fermento, ofte kun aldono de fruktoj, tre saniga por la intestoj.

Gladi: Glatigi per varmega ilo, ĝin premŝovante tien kaj reen (sur tukoj, vestoj ktp).

Ĝiri: Transpagi iun sumon el sia konto en la konton de iu alia.

Provizi: Havigi, laŭ pli-malpli granda kvanto, tion, kion oni povas bezoni.

Blogo: Interreta taglibro.

Grimpi: Pene transloki sian korpon sur oblikva aŭ vertikala supraĵo per helpo de piedoj kaj de manoj.

Eventuale: Fari ion en okazo de bezono.

Protokolo: Oficiala raporto, per kiu rajtigita aŭ kompetenta persono konstatas, kion li faris, vidis, aŭskultis.

Bilanco: Tabela kalkulo, laŭ aktivo kaj pasivo, de la financa stato de firmao, kliento, asocio, ŝtato, k.s.

Kliento: Kutima aĉetanto de butikoj, kompanio, servoprovizanto (notario, advokato, kuracisto...).

Lunĉo: Malpeza, malmulta manĝo, kiun oni konsumas tagmeze.



Sorĉa arbaro

**Verkis : José de Jesús Campos
Pacheco kaj Luiza Carol**

[La knabo Karlo estas desegnanta ĉe sia tablo. Avino proksimiĝas al li.]

1. Ĉambro de Karlo.

AVINO: Ĝojan naskiĝtagon, Karlo!
(*Brakumas lin.*) Jen donaco por vi, karulo.
(*Donas al li skatolon.*) Vi desegnas tre bele,
Karlo karulo! Ĉi-matene, mi renkontis la
estron de la kulturdomo, kiu rakontis al
mi, ke li invitis vin ekspozicii tie... Mi estas
tre fiera pri viaj desegnaĵoj! Sed karuleto,
malfermu la skatolon!

KARLO: (*Malfermas la skatolon kaj
rigardas la donacon.*) Dankon, dankon,
Avineto! Via donaco ĝojigas min!
Kolorkraĵoj, kolorfarboj... kaj peniko!

AVINO: Aŭskultu min, karuleto! Tiu ĉi
peniko estas magia. Koboldo kiu vivas en
Sorĉa Arbaro donacis ĝin al mi kiam mi
estis knabino...

KARLO: Kie troviĝas Sorĉa Arbaro?

AVINO: Ĝi troviĝas proksime de helblua
rivero. Tie ĉiam estas ĉielarko tage, kaj
multaj steloj brilas en la ĉielo nokte.

KARLO: (*Pripensas.*) Se mi povus
promeni tra Sorĉa Arbaro kaj tie desegni...

AVINO: Karlo, mi iros al vendejo por aĉeti
farunon kaj sukeron por prepari torton.
Mi revenos tuj.

KARLO: Intertempe mi desegnos per tiuj
ĉi donacitaj kolorkraĵoj kaj kolorfarboj...

2. Duonhoron poste.

*[Karlo desegnas. Subite alvenas hundo, kiu
prenas la magian penikon.]*

KARLO: Hundo, kion vi faras? Lasu mian
penikon ĉi tie! Hundo, revenu ĉi tien!

*[Karlo kuras por atingi la hundon, sen
percepti ke li subite troviĝas en sorĉa loko.]*

KARLO: Maltrankvila hundo! Mi sukcesis
atingi vin! Redonu mian penikon... Ho! Kio
estas tio?

HUNDO: Uuau, uuau. Jen kajero kun
blankaj paĝoj, por desegni.

KARLO: Ho! Ĉu vi kapablas paroli?

HUNDO: Ĉiuj parolas ĉie tie, en Sorĉa
Arbaro. Kiuj estas tiuj?

KARLO: Tiu kiu havas ruĝan koltukon
estas ludil-pirato. Kaj apude estas... Ho,
apude estas Feino! Ni proksimiĝu por aŭdi
kion ili parolas...

LUDIL-PIRATO: Feino, jen via saketo kun
magia pulvoro.


FEINO: Koran dankon! Mi perdis
ĝin hieraŭ matene dum...

LUDIL-PIRATO: Mi trovis ĝin, kaj
mi redonas ĝin al vi.

FEINO: Kial vi aspektas tiom
malfeliĉa? Ĉu okazis io malbona
al vi? Ĉu mi povas helpi vin per
magio?

LUDIL-PIRATO: Bedaŭrinde via
magio ne sukcesus helpi min. Mi
ĉagreniĝas, ĉar oni diras ke ludil-
piratoj estas malhonestuloj, kaj pro
tio oni forpelis min el la ludejo.

FEINO: Vi ŝajnas tre bonkora kaj
ĝentila ludilo. Sed kial vi fariĝis



Desegno: Odélvis del Sol Reyes.



pirato? Pirato estas tiu kiu rabas ŝipon. Sed honestulo ne rabas. Do...

LUDIL-PIRATO: Mi vidis filmon, en kiu piratoj rabas ŝipon, poste iliaj geamikoj gratulas ilin kaj diras, ke ili estas tre kuraĝaj. Do, ankaŭ mi volis simili al tiuj kuraĝuloj...

FEINO: Ne, ne, karulo. Rabi kaj ŝteli ne estas imitinda konduto. Tiu ŝipo transportis varojn, kiuj ne estas viaj. Pro tio, la policano arestis la piratojn. Ili estas malhonestuloj. Sed vi estas etulo, vi estas eĉ ludilo de etulo, tial vin la policano ne arestis. Tamen li riproĉis al vi kaj akre admonis vin, ĉu ne?

LUDIL-PIRATO: *(kapjesas)*

FEINO: Nun vi promesu, ke vi ne sekvu pli aĝajn knabojn kiuj agas malhoneste. Ĉu?

[Ludil-pirato promesas. Karlo kaj la hundo proksimiĝas kaj salutas.]

KARLO: Saluton! Jen donaco por vi, sinjoro ludil-pirato.

LUDIL-PIRATO: Koran dankon! Kia surprizo! Knabo vi desegnas beleĝe!!

HUNDO: Ne estu malĝoja, karulo. Vi ja kapablas esti honesta kaj bonkora, do vi ĝojigos knabojn dum ludado, ĉu ne?

LUDIL-PIRATO: Viaj vortoj kuraĝigas min.

KARLO: Ĝis baldaŭ. Mi invitas vin al mia naskiĝtaga festo.

FEINO: Dankon, mi certe estos tie. Sed nun mi hastu por helpi infanon, kiu perdiĝis en la arbaro. Ĝis baldaŭ!

LUDIL-PIRATO: Ĉu vi permesas, ke mi akompanu vin? Mi ne plu volas reveni al miaj antaŭaj amikoj. Mi ne plu fidus ilin nun... Mi ne plu volas esti pirato. Mi volas elekti alian okupon.

KARLO: Tre bone. Venu kun ni, kara ludilo.

3. Karlo kaj la hundo daŭrigas la promenon tra Sorĉa Arbaro, kune kun la eksa ludil-pirato.

KARLO: Ho! Hundo, kio okazas tie? Kiu estas tiu ludilo kiu parolas laŭte?

LUDIL-SOLDATO: Kapitulu, serpento! Eliru el ĉi tie! Lasu la birdidojn kvietaj aŭ mi... Mi ne deziras vundi vin per...

SERPENTO: Sed mi malsatas... Mi terure malsatas! Kion mi faru?

KARLO: Aŭskultu min, Serpento! Mi invitas vin en mian hejmon, kaj mi regalos vin per lakto kaj fromaĝo. Mia avino estas preparanta naskiĝtagan torton por mi. Vespere, mi regalos vin per torto kaj per ĉiuj bonaĵoj kiujn Avinjo preparos...

SERPENTO: Dankon kara knabo, sed mi ne povas akcepti vian afablan inviton. Mi apartenas al Afrika specio de serpentoj, kiuj povas manĝi nur ovojn... Nenion alian mi povas manĝi. Mi tute ne deziris manĝi la birdidojn! Mi eĉ ne havas dentojn!! Mi estas tute sendanĝera besto! Mi nur esperis trovi ovojn en tiu nesto...

LUDIL-SOLDATO: Do vi volis ŝteli ovojn!... Vi ja estas ŝtelisto!

SERPENTO: Mi konfesas ke jes. Ĉar mi estas terure malsata. Sed ne troviĝis ovoj en la nesto... Mi venas el Afriko, el ĝardeno de lernejo, kie la infanoj nutris min per ovo de koturnoj. Tie mi ne devis ŝteli. Kaj tiuj ovoj estis aĉetitaj el supermarkto, do el ili neniuj birdido povintus naskiĝi. Al neniuj mi faris malbonon...

LUDIL-SOLDATO: Do, kial vi venis ĉi tien?

SERPENTO: La infanoj de la afrika lernejo korespondis per Esperanto kun lernejanaj de via urbo. Kaj ili sendis min kiel donacon por la infanoj de via urbo.

KARLO: Per Esperanto?! Ankaŭ en mia lernejo ni korespondas kun iu klaso de lernejanaj de Afriko. Ili sendis al ni iun donacon, por la ĝardeno de nia kulturdomo. Sed tiu donaco ankoraŭ ne alvenis. Eble...

SERPENTO: Mi ja devintus alveni al iu kulturdomo, kie ekzistas eta ĝardeno kun belaj plantoj kaj mildaj bestetoj...



Tie infanoj zorgas pri leporoj, sciuroj, testudoj... Sed fiaj piratoj atakis la ŝipon kaj frakasis la vitran keston en kiu mi vojaĝis. Mi fuĝis el la ŝipo... kaj hazarde alvenis al Sorĉa Arbaro... Ĉi tie ĉio belas, sed mankas al mi ovojn...

KARLO: Mi povus regali vin per ovoĵ de kokino, kaj...

SERPENTO: Ne ne. Mi povas engluti nur malgrandajn ovojn. Mi bezonas nur po unu krudan kaj nefrakasitan ovon ĉiusemajne. Sed mi jam malsatas de pli ol semajno. Se vi kondukos min al la kulturdomo, tie oni espereble zorgos pri mi... Sed en la homa mondo, mi ne povos paroli. Mi ege petas vin, Karlo, memoru la nomon de mia specio: Dasipeltis. Sur mia vitra skatolo estis skribita tiu ĉi nomo. Sed nun la skatolo ne plu ekzistas. Se vi informos la estron de la kulturdomo pri la nomo de mia specio, espereble oni scipovos zorgi pri mi...

KARLO: Jen, mi skribas surpapere la nomon, por ke mi ne forgesu ĝin: Dasipeltis.

EKSA LUDIL-PIRATO: Mi tre hontas, geamikoj. Mi hontas ke mi helpis tiujn fi-piratojn. Nun, mi serĉos honestan laboron.

KARLO: Mi aŭdis, ke ĝuste nun oni bezonas bonan zorganton por la kulturdoma bestĝardeno.

EKSA LUDIL-PIRATO: Mi estus plej feliĉa zorgi pri bestoj kaj plantoj tie.

LUDIL-SOLDATO: Amikoj, ankaŭ mi konfesas, ke mi volas ŝanĝi mian okupon. Hieraŭ vespere mi eliris el la ludejo, ĉar mi abomenas militon kaj mi malĝojas kiam infanoj amuzas sin per milit-ludoj. Mi estas pacema ludilo, kaj mi volas esti homo kiu gardas pacon, amas bestojn kaj protektas infanojn. Mi volas ke militoj malaperu el la tuta mondo, por ke homoj, bestoj kaj ludiloj vivu pace.

HUNDO: Ni ĉiuj ĉi tie amas pacon, kaj mi feliĉas ke vi estas pacema ludilo. Multaj homoj devus lerni vivi paceme, por ke neniu plu suferu pro milito.

KARLO: Ludil-soldato, ne ĉagreniĝu plu. Mi proponas al vi fariĝi ludil-policano. Via devo estus protekti infanojn, bestojn kaj ludilojn.

LUDIL-SOLDATO: Konsentite! Ekde nun, mi fariĝas ludil-policano. Mi kondukos vian amikon kaj la serpenton al la kulturdomo.

KARLO: Bonege!!! Nun mi foriras, ĉar mia avino atendas min hejme. Mi invitas vin ĉiujn al mia naskiĝtaga festo. Ĝis baldaŭ! (al la hundo) Ni revenu hejmen, hundo!

4. Survoje hejmen.

[Ludil-sorĉistino kolorigas la flugilojn de papilio. Karlo desegnas la sorĉistinon kaj la papilion, dum la hundo rigardas ilin.]

LUDIL-SORĈISTINO: Jen! Mia laboro estas finita!

PAPILIO: Koran dankon. Vi sukcesis kolorigi miajn flugilojn kaj zorgis pri ili. Vi estas tre afabla.

KARLO: Sorĉistino! papilio! Mi volas donaci al vi tiujn du desegnaĵojn. Mi desegnis vin, sorĉistino, helpantan la papilion. Kaj en tiu dua desegnaĵo, la papilio dankas vin kaj flugas inter bonodoraj rozoj.





Desegnis: Odelvis del Sol Reyes.

invitas vin al mia naskiĝtaga festo.
(Li donas la desegnaĵon al la koboldo.)

KOBOLDO: Koran dankon. Mi antaŭĝojas partopreni vian feston! Nun vi volas reveni hejmen, ĉu ne? Manĝu tiujn sorĉajn fruktojn, kaj vi tuj estos en la korto de via domo. Sed jen kroma donaco. Tiu ĉi estas libro por kolorigi ĉiujn loĝantojn de Sorĉa Arbaro.

KARLO: Koran dankon!

[Karlo kaj la hundo manĝas fruktojn kaj ili tuj troviĝas en la korto de la domo.]

AVINO: Karlo, kie vi estas? Venu ĉi tien! Viaj amiketoj jam estas ĉi tie kaj atendas vin!

[Karlo eniras la domon, kie atendas liaj geamikoj. Alvenas ankaŭ la loĝantoj de Sorĉa Arbaro, alportante donacetojn. Sur la tablo estas torto.]

[La sorĉistino kaj la papilio rigardas la desegnaĵojn kaj dankas.]

KARLO: Mi invitas vin al mia naskiĝtaga festo en la homa mondo.

LUDIL-SORĈISTINO: Dankon pro inviti min, sed mi ne venos, ĉar tie multaj geknaboj malamas sorĉistinojn. Ili supozas, ke ni ĉiuj estas malbonaj estaĵoj...

PAPILIO: (Al la sorĉistino) Ne diru tion!! (al Karlo) Ni kune venos al via naskiĝtaga festo, kaj ni ege amuzos nin tie!

KARLO: Do, mi atendas vin!

[Karlo, kaj la hundo foriras.]

5. Kelkajn minutojn poste, aperas koboldo.

KOBOLDO: Saluton Karlo! Saluton Hundo! Kiel vi fartas?

KARLO kaj HUNDO: Tre bone!

KARLO: Ĉu vi estas la...?

KOBOLDO: Jes, mi estas la koboldo, pri kiu via avineto parolis. Tiu aventuro tra Sorĉa Arbaro estas mia donaco por via naskiĝtago! Mi gratulas vin pro krei belajn desegnaĵojn pri tiu aventuro.

KARLO: Atendu iomete! (Eta paŭzo.) Jen! Tiu desegnaĵo estas por vi. Mi



Odelvis del Sol Reyes desegnis ludon: La knabo kaj la ludiloj iros al la cirko kaj ili devas trovi la taŭgan vojon.



La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka

malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti – kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestite alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin pri fremda lingvo. La laboro kun kanto sentigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.



Abio estas la daŭre verda arbo kaj dank' al tio ĝi simbolas renoviĝon de la vivo. Fine de la jaro, proksime de Kristnasko, tradicie ni ornamas abion per diversaj dekoracioj. La kutimo de la ornamado de kristnaska arbo devenas el Germanio, kie per arboj aŭ plantoj oni ornamis la domon jam en la mezepoko.

La kristnaskajn lampetojn inventis Edward Johnson en 1882, helpanto de Thomas Edison. Bela kristnaska kutimo estas ankaŭ sidi familie ĉirkaŭ la abio kaj kanti kristnaskajn kantojn.

Tial ĉi-numere mi proponas germanan kristnaskan kanton "Abio vi" (germane: *O Tannenbaum*). La kanton prilaboris Julio Csobán kaj el la germana lingvo esperantigis ĝin Paul Christaller.

La kanton mi trovis, vizitante la paĝaron:

https://kantaro.ikso.net/abio_vi

Abio vi

*Abio vi, abio vi,
kun foliar fidela!
Vi verdas ne nur en somer',
sed eĉ dum vintra neĝa ter'.*

*Abio vi, abio vi,
kun foliar fidela!
Abio vi, abio vi,
Al mi tre multe plaĉas.
Ho, kiom ofte ĝojis mi
en la kristnaska bril' de vi!
Abio vi, abio vi,
Al mi tre multe plaĉas.*

*Abio vi, abio vi,
instruon donas bonan:
Espero kaj la konstantec'
konservas forton de junec'.
Abio vi, abio vi,
instruon donas bonan.*



Feliĉan Kristnaskon!



Abio vi

(O Tannenbaum)



El la Germana lingvo esperantigis: Paul Christaller

Germana Kristnaska kanto;
prilaboris: Csobán Gyula Endre

S
A

1.A - bi - o vi, a - bi - o vi, kun fo - li - ar' fi - del - a! Vi
2.A - bi - o vi, a - bi - o vi, al mi tre mul - te plaĉ - as. Ho,
3.A - bi - o vi, a - bi - o vi, in - stru - on don - as bon - an: e -

T
B

5

1.verd-as ne nur en so-mer', sed eĉ sur vintr - a neĝ - a ter'. A -
2.ki - om oft - e ĝoj - is mi en la Krist-nask - a bril' de vi! A -
3.sper-o kaj la kon-stantec' kon - serv - as fort - on de jun-ec'. A -

9

1.bi - o vi, a - bi - o vi, kun fo - li - ar' fi - del - a!
2.bi - o vi, a - bi - o vi, al mi tre mul - te plaĉ - as.
3.bi - o vi, a - bi - o vi, in - stru - on don - as bon - an.



Nova jaro instigas nin plani ŝanĝojn kaj mi proponas, ke instruistoj jam pripensu variigi la lecionojn, enkondukante kantojn. **Kantoj por kursoj** aĉeteblas ĉe: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8522>. Venontjare mi kun la aŭtoro Stano Marček prezentos kelkajn kantojn el ĝi. Vidu ankaŭ: <http://stano-auskultejo.bplaced.net/>; <http://stano-auskultejo.bplaced.net/mp3/kantoj/>



Kantu kaj lernu! Bonvolu sendi al mi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo: malgosa.junaamiko@gmail.com





Prago kaj ĝia historia allogaĵo – la Ponto de Karolo

Prago (ĉeĥe *Praha*), la ĉefurbo de Ĉeĥio (Ĉeĥa Respubliko) estas unu el la plej belaj kaj fascinaj urboj de Eŭropo. 8 milionoj da turistoj el la tuta mondo vizitas Pragon ĉiujare, farante ĝin unu el la fokuso, centroj de eŭropa turismo.

Pro sia impona arkitekturo, etoso kaj historia signifo Prago estas nomata “Ora Prago” (*Zlatá Praha*), la “Urbo de Cent Turoj”, la “Romo de la Nordo” aŭ la “Patrino de Urboj”. La historia centro de Prago kun i.a. la Praga Burgo (ĉeĥe *Pražský hrad*) kaj la Ponto de Karolo troviĝas en la listo de Monda Heredaĵo de Unesko.

La fama historia ponto de Karolo (ĉeĥe *Karlův most*) super la rivero Vultavo (ĉeĥe *Vltava*), estas unu el la plej famaj kaj plej ofte vizitataj turismaj allogaĵoj de la urbo. Ĝi estas vera simbolo de Prago kaj de la ĉeĥia kulturo kaj historio. La ponto situas en la koro de Prago kaj ligas la historian Malnovan Urbon (ĉeĥe *Staré Město*) kun la bunta kvartalo Malgranda Urbo (ĉeĥe *Malá Strana*). De la ponto etendiĝas belega panoramo de Prago – bone videblas, i.a. la bordoj de la rivero Vultavo kaj la kastela altaĵo Hradčany kun la Praga Burgo.

La Vultavo estas la plej longa rivero en Ĉeĥio, ĉ. 430 km longa. La jaro 2025 estas oficiale proklamita la Jaro de la Rivero Vultavo. Ŝipvojaĝado laŭ Vultavo estas bonega maniero rigardi Pragon el iom alia perspektivo. La Karola ponto estas unu el la plej malnovaj konservitaj ŝtonaj pontoj en la mondo. Komence oni nomis ĝin la Ŝtona Ponto aŭ la Praga Ponto. La nomo de Karolo, honore al la fondinto de la ponto, imperiestro Karolo la 4-a, akceptiĝis nur ĉ. 1870. Ĝis 1741 ĝi estis la sola ponto super la rivero Vultavo en la urbo. Ĉiutage ĉ. 30 mil

turistoj promenadas laŭ la ponto de unu parto de la urbo al la alia.

La konstruaĵo, el sabloŝtono, estas 516 m longa kaj 9,50 m larĝa kun 16 pontoarkaĵoj kaj 15 ŝtonaj kolonoj. Ĝia ŝtonaĵo ligas gotikajn, renesancajn kaj barokajn elementojn. La ponto estis konstruita laŭ la ordono de la germana-romia imperiestro Karolo la 4-a en la 14-a jc. Li apartenis al la luksemburga dinastio kaj estis unu el la plej gravaj imperiestroj de la malfrua mezepoko kaj unu el la plej influhavaj eŭropaj regantoj tiutempaj. En Ĉeĥio li estis nomata “Patro de la Patrujo”. Karolo faris Pragon unu inter centroj de Eŭropa kulturo. Li fondis la Pragan Universitaton (1348), kiu nun portas lian nomon, konstruigis Novan Pragan Urbon kaj konektigis ĝin kun la Malnova Praga Urbo per grandioza ponto (Karola ponto).

La imperiestro petis opinion de astrologoj pri la plej favora tempo por komenci konstrui la ponton. La steloj signis la simbolon de Leono kaj la nombran vicon 1-3-5-7-9-7-5-3-1. Tiel la imperiestro mem enmetis la bazŝtonon en jaro 1357, en ties 9-a monato (Septembro), la 7-a tago kaj je la 5-a horo kaj 31 minutoj. La dato ne estis hazarda. Tiamaj astrologoj agnoskis, ke tiu konkreta dato, formante “magian” nombran vicon, devintus certigi al la ponto daŭrecon kaj firmecon. Oni povas rimarki, ke ĉiuj ciferoj en la supra nombra vico estas neparaj. Interese, ke legante de ambaŭ flankoj, la ciferoj estas la samaj (inversigeblaj ciferoj). Tion oni nomas en lingvistiko palindromo, kio estas vorto, frazo aŭ nombra vico, sencohave legebla ambaŭdirekte (ambaŭsence). Alia ekzemplo pri apliko de palindromo en la frazo: Ne mateno, bone tamen? Do, ĉi-jare (2025) la ponto de Karolo celebras sian 668-jariĝon. La konstruado de la ponto daŭris



preskaŭ duonjarcenton kaj estis finita en la 15-a jarcento. Antaŭ jarcentoj laŭ la ponto kondukis la reĝa vojo. La ponto havas ankaŭ sombran historion. Komence, ĝi estis loko de publikaj ekzekutoj.

La Karolan Ponton gardas tri turoj – Turo de la Malnova Urbo kaj la du Turo de la Malgranda Urbo. Ambaŭ servis defendajn kaj ceremoniajn celojn. La plej impona estas la Malnovurba pontoturo. Ĉe ĝia kulmino estas alirebla teraso kun splenda panoramo de ĉirkaŭaĵo. Por atingi ĝin, oni devas grimpi 138 ŝtupojn. Tiu ĉi pontoturo, el la dua duono de la 14-a jarcento, fieras per sia skulpta ornamaro. La statuoj sur la turo de du konstruintoj kaj tri sanktuloj apartenas al la plej bonaj skulptaĵoj de tiu epoko en Eŭropo.

Apud la Malnovurba pontoturo staras la novgotika monumento al Karolo la 4-a, starigita en 1848 okaze de la 500-jariĝo de la fondiĝo de universitato en Prago. La ponto de Karolo estas ornamita per 30 skulptaĵoj kaj skulptaj grupoj kiel subĉiela galerio, plejparte el la 18-a jarcento. Ili prezentas sanktulojn, figurojn religiajn, mitologiajn, alegoriajn kaj rilatajn al la ĉeĥia historio. Ĉiu statuo rakontas sian propran unikan historion, aliformante la Karolan Ponton en eksterordinaran subĉielan galerion. La skulptaĵoj reflektas la kulturen, historian kaj religian diversecon de Ĉeĥio. Oni kredis, ke la skulptaĵoj havas la potencon protekti kontraŭ malfeliĉo. Laŭ populara praga legendo, ektuŝo unu konkretan bareliefon sur la Karola Ponto povas certigi feliĉon kaj revenon al Prago. Multaj el tiuj originalaj statuoj estis anstataŭigitaj per modernaj kopioj, kaj la originaloj nun troviĝas en la Lapidario de la Nacia Muzeo.

La plej malnova statuo de la Karola ponto, starigita en 1683, estas tiu de sankta Johano Nepomuka (ĉeĥe *Jan Nepomucký*) en aŭreolo kun steloj. La sanktulo estas konsiderata la patrono de Bohemio, pontoj, akvaj danĝeroj k.a.; li estas ankaŭ simbolo de Prago. Sankta Johano Nepomuka estas tre grava figuro por la ĉeĥoj. Li estis 14-jarcenta kristana sacerdoto, kiu rifuzis malkaŝi al la

reĝo de Bohemio Venceslao la 4-a sekreton de la konfeso de la reĝino kaj pro tio estis mortigita de la reĝo. En 1393 en la loko sur la Ponto de Karolo, kie staras la statuo, Johano Nepomuka, estis jetita en la riveron Vultavo laŭ la ordono de la reĝo Venceslao la 4-a. Tiel Nepomuka estiĝis martiro kaj en 1729 estis sanktigita. Sube de la skulptaĵoj de sankta Johano Nepomuka estas alfiksita plato, kiu prezentas scenon de lia ĵeto en la riveron Vultavo. Urba legendo diras, ke tuŝi la platon alportas feliĉon, bonŝancon kaj plenumon de viaj deziroj. Pro tio, multaj turistoj kaj praganoj ofte haltas por tuŝi la platon sur la statuo de la sanktulo.

Venu al la Ora Prago kaj ĝuu ĝiajn historiajn valorojn!

Jerzy Dryja, Pollando



La Pontoturo de Malnova Urbo, kun skulpta ornamaro. Foto: la aŭtoro.



El mia kolora vivo


Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Kion vi vidas sur la bildoj?
Kiom da diferencoj en la du bildoj vi trovis?

Tempo kaj cirkons- tancoj saĝon alportas

La rubrikon prizorgas: **Mónika Molnár**




Kontentulido ĉiam estis gaja knabeto. En ĉiuj lokoj, en ĉiuj situacioj li trovis almenaŭ unu ion, pri kiu li povis esti kontenta.


En bela suna tago li kontentis pri la mildaj sunradioj kaj dum pluva tago pri la posta bel-verda naturo. Lia plej bona amiko estis Kantemulido. Ne estas mirige, ja ankaŭ Kantemulido estis gaja knabeto, kiu ofte kaj elkore kantis eĉ dumvoje al la lernejo. Kiel ankaŭ tiun belan merkredan tagon, kiam li iris kantante al la lernejo:

„Mi povus flugi per flugiloj, flugi per flugiloj, kiel la birdoj, miaj amikoj, la birdoj miaj amikoj, alten al vi.” Por la dua strofo li jam havis kunkantanton,

ĉar Kontentulido volonte aliĝis al li: „Mi povus naĝi per naĝiloj, naĝi per naĝiloj, kiel la fiŝoj, miaj amikoj, la fiŝoj miaj amikoj, funden al vi.” Kaj la du amikoj afiŝis ĝisorelan rideton sur la vizaĝo. En tiu momento ili renkontis Revemulidon, kiu estis tiom profunde en siaj pensoj, ke li apenaŭ rimarkis la du kantantojn. – Hej, Revemulido! Ĉu vi ne rekonas nin? – demandis la du amikoj. – Kio? Kiel? Kial? – balbutis surprizite Revemulido kaj aldonis – Pardonu min, sed mia kapo estas en mia pasintnoka sonĝo... Jen ĝi, bonege prezentita de Yaku [ˈjakuː]. Aŭskultu kaj helpu min solvi ĝian signifon.



**Yaku
Matter-Maytain:
Testudo, kiu
eliris de nenie**








En la nokto, kiam la luno estis alta, granda birdo alportis testudon en la aeron kaj post iom da tempo faligis ĝin sur aŭtobuson.



La aŭtobuso iris al Parizo. La testudo, kiu nomiĝis Petro, profitis de haltejo por elbusiĝi. Li iris al la universitato por lerni la francan lingvon.



		
Petro, la testudo, kiu eliris de nenie, kiu neniu konis antaŭe, ricevis sian diplomon. Li volis fariĝi urbestro. Dum la urba voĉdonado li gajnis kontraŭ Francisko.	Li fariĝis eĉ milionulo. Tiam Petro ekhavis novan ideon. Li volis fariĝi astronauto kaj iri sur la Lunon, malkovri la universon, vidi la stelojn de proksime.	Petro malkovris novajn planedojn en la sunsistemo kaj vizitis aliajn. Sur la planedo, kiu nomiĝis Marso, ĉio estis ruĝa. Li plantis tie la flagon de Esperanto.
		– Mi ŝatas tiun ĉi sonĝon. Kio estas via problemo pri ĝi? – miris Kontentulido. – Mi ne vere scias... Eble ĝi signifas ion kaj mi timas ne kompreni ĝin. – respondis Revemulido. Ho, eble ĝi signifas, ke oni kaptu ĉiam tiun eblon, kiu doniĝas, ĉu ne? – demandis Kontentulido. – Aŭ simple: „En la sonĝoj ĉio ja eblas, flugi kaj gliti, kiam printempas, bele al vi.” – aldonis kantante Kantemulido. – De kie venas tiu ĉi bela kanto? – demandis heziteme Revemulido.
Petro daŭrigis sian vojaĝon por iri ankaŭ sur aliajn planedojn, kiel ekzemple Saturno. Poste li reiris sur la Teron por daŭrigi esti urbestro. Tiam Petro ekhavis novan ideon.	Li volis fariĝi prezidento. Li denove gajnis la voĉdonadon kaj fariĝis prezidento. Poste li inventis novan rakedon, kiu povis iri en la kosmon eĉ pli foren ol antaŭe.	

– Ĉu vi ne konas ĝin? Ĝi nomiĝas „Sonĝo-monde” kaj troviĝas sur la 9a KD de Kajto! Kaj ne timu, ne ĉio okazas en la sonĝoj, ja: „Same veke multo ja eblas naĝi kaj marŝi, eĉ kiam ventas, gaje al vi.” – aldonis kantante Kantemulido kaj amike ĉirkaŭbrakumis la ankoraŭ surprizitan, revantan Revemulidon.



Lupo: danĝera por la ŝafoj, sed protektita speco

En la menso de infanoj, poste homoj, lupo estas danĝera besto, ĉar ĉiuj memoras la fabelon pri “Ruĝa Ĉapo”.

Tiu knabineto, kiu tra la arbaro portis kukon al la avino. Ŝi estis kaptita de lupo, kiu poste kuŝiĝis en la lito de la avino kaj ŝajnigis, ke li estas la avino, eĉ se la knabino rimarkis, ke ĝi havas grandajn dentojn, “por pli bone vin manĝi, infano mia”. Ŝi estis savita de ĉasistoj, kiuj mafermis la ventron de la besto.

Tamen de 30 jaroj en Francio la lupo estas protektita besto, ĉar ĝi preskaŭ malaperis. Sed plu okazas disputo inter bestoamantoj (necesas protekti tiun specon) kaj bredantoj de ŝafoj, kiuj perdis 10.000 bestojn, mortigitajn de lupoj, ne ĉar ili malsatas, sed ĉar ili estas ĉasistoj kaj ne plu timas homojn!

La lupo estas tre inteligenta besto, sed la homo perdis la kutimon kunvivi kun ĝi kaj dividi la spacon, dum la lupo

alkutimiĝis al la homa ĉeesto: ĝi ĉasas eĉ tage, ne nur nun nokte.

Ŝafoj manĝas herbojn kaj arbidojn, sekve ili helpas al konservado de naturaj spacoj, klasifikitaj de UNESKO. 95 procentoj de la francaj bredistoj estas kontraŭ protektado de la lupoj, kiuj revenis el Italio tra la Alpoj.

Leĝoj permesas al la ŝafistoj pafmortigi lupojn, se ili atakas, do por protekti sian ŝafaron. Ili bredas ŝafojn kaj suferas, kiam matene ili trovas mortigitajn ŝafinojn aŭ ŝafidojn.

Kiel sin protekti? Ekzistas diversaj eblecoj: lokigi la ŝafojn nokte en ŝafejojn, sed tiam ne plu temas pri la natura vivo de la ŝafoj; ĉirkaŭigi la paŝtejojn per dratoj aŭ/kaj elektraj retoj, kiuj forpelas la lupojn; peti la helpon de grandaj hundoj;

se lupoj venas are, instalati fotokaptilojn, por spioni la lupojn...

Kiel trovi la ekvilibron? Ekde la jaro 2024 Francio per leĝoj reguligas la nombron da lupoj, kiujn oni rajtas mortigi.

En 2015 estis kreita nacia “lup-brigado” por interveni, rekomendi, ktp.

Sed ĉiuj sopiras pri la itala maniero alkutimiĝi vivi kun lupoj, ne konsiderante ilin malamikoj, sed kun-estantoj.

Renée Triolle





Ŝopeno 2025 – granda muzika festo en Pollando

De la 2-a ĝis la 23-a de Oktobro 2025 okazis en Varsovio, la ĉefurbo de Pollando, unu el la plej gravaj kulturaj eventoj en la mondo, la 19-a Internacia Pianista Konkurso nome de Frederiko Ŝopeno.

La konkurso organizis la Nacia Instituto de Frederiko Ŝopeno (*Narodowy Instytut Fryderyka Chopina*) kaj ĝi estis elsendita, disaŭdigita kaj transsendita per televido, radio kaj interreto. Pollando fariĝis granda koncertejo. Ĉiu polo aŭskultis Ŝopenon, ĉar poloj amas lian muzikon, kapablas aŭskulti ĝin kaj sperti ĝin. Frederiko Ŝopeno (*Fryderyk Chopin*) estas simbolo de poleco, inspirita de pola folkloro, komponante de poleco, inspirita de pola folkloro, komponante por la piano, kreante mazurkojn, polonezojn, nokturnojn, etudojn kaj baladojn...

Tio estis belaj momentoj, plenaj de emocio, fiereco, sed ankaŭ iom da nervozeco kaj seniluziiĝo...

Por la Konkurso anoncis sin 642 (!) pianistoj el 54 landoj, el kiuj 171 pianistoj el 28 landoj kvalifikiĝis por la konkursaj eliminoj. La konkursaj eliminoj okazis de la 23-a de Aprilo ĝis la 4-a de Majo



La koncerta salono.



2025. La 6-an de Majo 2025, en la Muzeo de Frederiko Ŝopeno en Varsovio, la organizantoj anoncis la liston de pianistoj kvalifikitaj por la ĉefa konkurso en Oktobro.

La 2-an de Oktobro 2025, ĉe la Nacia Filharmonio (*Filharmonia Narodowa*), komenciĝis la 19-a Internacia Pianista Konkurso nome de Frederiko Ŝopeno. Por la unua fojo en la historio de la konkurso, estis elektitaj kvin novaj jurianoj, kaj por la unua fojo, fremdulo estis elektita kiel ĵuriestro. Ankaŭ okazis ŝanĝo en la reguloj por ĵuĝi la pianistojn.

La 3-an de Oktobro 2025 komenciĝis la unua etapo de la konkurso, kiu daŭris



Piano de la marko Érard, per kiu ludis Frederiko Ŝopeno en *Złoty Potok*.



La 20-jarulo Piotr Alexewicz.

5 tagojn. Partoprenantoj prezentis laŭ la regularo kvar verkojn dum 25-30 minutoj en po du sesioj: matenaj kaj posttagmezaj, kun deviga unu etudo kaj unu valso. 40 pianistoj el 13 landoj kvalifikiĝis por la dua etapo, kiu daŭris 4 tagojn.

Ekde la 9-a de Oktobro, la partoprenantoj prezentis elektitajn verkojn dum 45 minutoj en du sesioj: matenaj kaj posttagmezaj, kun devigaj preludoj kaj unu polonezo. 20 pianistoj el 8 landoj kvalifikiĝis por la tria etapo. Ekde la 14-a de Oktobro, dum tri tagoj, la partoprenantoj prezentis elektitajn verkojn dum 50 minutoj en du sesioj: matenaj kaj posttagmezaj, kun devigaj sonato kaj la kompleta ciklo de mazurkoj. 11 pianistoj el 7 landoj kvalifikiĝis por la finalo, kiu komenciĝis la 18-an de Oktobro.

La finalistoj prezentis unu el du fortepianaj konĉertoj de Frederiko Ŝopeno: *Mi-minoran* Op. 11 aŭ *Fa-minoran* Op. 21 kaj la devigan Polonezo-Fantazion en A-bemolo-maĵoro, Op. 61. Ŝopeno komponis la unuajn du verkojn, prezentitajn en la finalo de la konkurso, antaŭ ol forlaso de Pollando, en 1829-1830, kaj ili estas bela ekzemplo de la kombinaĵo de virtuozezo kaj poezio. La deviga verko, aliflanke, permesas

taksadon de la arta matureco de la partoprenantoj kaj pli larĝan gamon da interpretaj eblecoj. La 21-an de Oktobro, en Granda Teatro (*Teatr Wielki*) en Varsovio okazis festa ceremonio kaj enmanigo de premioj al pianistoj. La unuan premion gajnis la usonano Eric Lu, ricevinte la oran medalon kaj 60 000 eŭrojn. Polo, Piotr Alexewicz, mirinda 25-jarulo el Vroclavo, okupis la 5-an lokon kaj ankaŭ gajnis la Premion de la Publika.

La Ŝopeno-Konkurso estas unu el la plej antikvaj kaj aktuale unu de la plej prestiĝaj muzikaj konkursoj. La kreinto de la konkurso estis profesoro Jerzy Żurawlew kaj, laŭ la tradicio, ĝi okazas ĉiun kvinan jaron jam ekde 1927, de sia ekesto. Same temas pri unu de raraj konkursoj de piano, dediĉitaj al unusola komponisto.

Certe, kiel estas tradicie, ĝi ankaŭ en 2030 elvokos diversajn emociojn... Tamen, gravas rekoni la klopodojn de ĉiu partoprenanto, ĉar ĉiu devas plenumi serion da tre postulemaj taskoj. La programo de la konkurso inkluzivas diversajn verkojn de Ŝopeno, postulante multflankecon kaj ampleksan gamon da pianaj kapabloj.

Konkursantoj estas lertaj pianistoj, kiuj devas ankaŭ, interalie, havi profundan scion pri la vivo, muziko kaj stilo de Ŝopeno, la elementojn de la pola kulturo, kiujn li referencis en siaj verkoj, kaj posedi la kapablon peri emocion per muziko...

Gajni la Konkurson de Ŝopeno alportas famon kaj malfermas la vojon al monda kariero.

Małgosia Komarnicka



La usonano Eric Lu.



Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka

Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



Kristnaska donaco



La nova jaro estas la perfekta tempo por halti kaj trankvile denove rigardi sian vivon, kaj denove retrovi sin mem. Neniam estas tro malfrue por ŝanĝo, sed ni memoru, ke ĝi dependas nur de ni.

Indas ofte legi la vortojn de Sokrato (greka filozofo; naskiĝis 469 a.K. – mortis 399 a.K.): “La sekreto de ŝanĝo estas koncentri vian tutan energion ne al la batalo kontraŭ la malnova, sed al la konstruado de la nova”.

Ni klopodu, ke niaj pensoj pri estontaj problemoj ne dominu nian ĉiutagecon. Ofte, tio, kio nin maltrankviligas, fakte ne okazas. Jes, malfacilaĵoj estas parto de nia vivo kaj foje povas esti subpremaj, sed ili helpas konstrui nian psikan forton, instruas nin kiel pli bone trakti estontajn defiojn, disvolvi rezistecon kaj doni al la vivo sencon kaj celon.

La hodiaŭa mondo lukta kun multaj problemoj, inkluzive de ekonomiaj, demografiaj, plimalboniĝantaj natur-mediaj kondiĉoj kaj sociaj kiel tutmondiĝo kaj konsumismo. Komplete forigi ĉi tiujn

problemojn neblas, sed ili povas esti efike administrataj kaj mildigitaj je la loka, tutmonda kaj eduka niveloj. Kaj do valoras enkonduki ŝanĝojn, kaj ilin ĉiam ni komencas de ni mem.


Dum kristnaska tempo, aŭ jam nun, tralegu belegan rakonton pri magia potenco de Kristnasko, metamorfozo de la karaktero kaj pri granda forto de boneco. Ĉi-sube vi ekkonos la titolon de la proponita rakonto kaj ĝian aŭtoron...

Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank’ al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekz. toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la supra adreso aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Rekomendo:

Por la Biblioteko de *Juna Amiko*, mi rekomendas la libron “**Kristnaska Kanto**” de **Charles Dickens** (<https://verkoj.com/dn/inko/071-6.pdf>). La libron esperantigis Martyn





Westcott. Ĝi estis eldonita de *Review of Reviews Office* en Londono, en la jaro 1905, sub la titolo “Kristnaska sonorado” kaj havis 83 paĝojn. En la jaro 2000 aperis lingve redaktita eldono jam sub la titolo “Kristnaska kanto”.

“**Kristnaska Kanto**” rakontas pri la avarulo Ebenezer Scrooge, kiu transformiĝis de senkora kaj avara egoisto kaj fariĝis kompata, varmkora, malavara kaj empatia. Dum Kristnasko, danke al la fantomoj de la pasinteco, nuntempo kaj estonteco, li komprenis la senesperecon de sia vivo. Li komprenis, ke mono ne alportas feliĉon kaj vera riĉeco estas amo, amikeco, empatio, respekto, zorgado pri aliaj kaj bonfaremo.



Ebenezer Scrooge estas bela ekzemplo de ŝanĝo. Li instruas al ni, ke neniam estas tro malfrue ŝanĝiĝi, sed ankaŭ li substrekas la gravecon de

bonaj interpersonaj rilatoj, reciproka helpo, solidareco, bonkoreco kaj socia respondeco. Li pravas, ke dividante bonon kun aliaj kaj estante bonkorulo ŝanĝiĝas vivo ne nur de tiuj, kiuj tion bezonas, sed ankaŭ nian propran, ĉar ni bezonas aliajn por esti feliĉaj.

La unua anglalingva eldono de “A Christmas Carol” (“Kristnaska kanto”) de Charles Dickens aperis en la jaro 1843 kaj estis ilustrita de John Leech. La unua E-traduko, de Martyn Westcott aperis en la jaro 1905 sub la titolo “Kristnaska Sonorado” kaj nur en la jaro 2000, lingve redaktita de Margaret Munrow, ricevis la titolon “Kristnaska kanto” laŭ la originala titolo.

Tiun belegan, unu el la plej konataj, multfoje tradukatan rakonton valoras tralegi ankaŭ pro la aŭtoro. Charles Dickens verkis ĝin en ekstreme mallonga tempo, dum nur ses semajnoj, por gajni monon kaj pagi siajn ŝuldojn. Tamen,

grava kaŭzo estis ankaŭ sociaj motivoj. Dickens volis direkti atenton de la riĉa parto de la angla socio al ekstrema malriĉeco kaj socia maljusteco kaj instigi ilin helpi kaj esti malavaraĵoj al tiuj, kiuj suferas. Kiel infano, li devis labori 10 horojn tage en ŝufabrika por pluvivi. Ĉi tio estis turnopunkto en lia vivo, kaj tial li plej ofte priskribis malriĉecon, avidecon, malamon, korupton, socian maljustecon, la malfacilajn vivkondiĉojn de malriĉuloj, Li gloris valorojn kiel lojaleco, dankemo, frateco, morala transformo kaj la kapablo trakti malprosperon. Li instigis kaj konstante instigas siajn legantojn al kompato kaj bonkoreco.

“Kristnaska Kanto”, malgraŭ paso de tempo, havas grandan influon sur ni kaj ĝia teksto plu estas tre aktuala: ĝi instruas, instigas al pripensado pri vivo kaj permesas al ni sperti la unikan magion de Kristnasko. Laŭ la rakonto naskiĝis multaj filmoj, teatraĵoj kaj operaj prezentadoj, radiodramoj, bildstrioj, baleto kaj eĉ muzikaloj.

Ekkonu skoltismon kaj ĝiajn simbolojn

Daŭrigante temon de ŝanĝoj ĉe la sojlo de nova jaro mi kaj Cristina Bolini, itala esperantistino, proponas al vi kelkajn informojn pri skoltismo. Eble iu el vi baldaŭ fariĝos skolto, skoltino...

Kial ni elektis skoltismon? Tial, ke partopreno en ĝi evoluigas nian karakteron, instruas respondecon, sendependecon kaj team-laboron.

Skoltismo estis fondita en Britio en 1907 de la brita milita generalo Robert Baden-Powell. En 1908 li evoluigis kaj formulis la





bazaĵojn de skoltismo en sia libro “Scouting for Boys” (Skoltismo por Knaboj), kiu fariĝis la fundamento por la disvolviĝo de la movado tutmonde. La generalo ankaŭ organizis la unuan skoltan tendaron sur la insulo Brownsea en Dorset.

Komence skoltismo estis nur limigita al knaboj, sed jam en 1910 estis establita la unua knabina skoltista organizaĵo. Robert Baden-Powell petis la helpon de sia fratino Agnes, por organizi la skoltin-movadon, kredante, ke la movado devus esti gvidata de virinoj. Poste, al la kunlaboro aliĝis la edzino de la generalo, lordino Olave Baden-Powell.

La simbolo de la skoltoj estas la lilio, kaj la ora trifolio sur blua fono estas la simbolo de la skoltinoj. La skolta lilio estas antikva kavalira simbolo, kiu simbolas purecon, kaj ĝiaj tri partoj rilatas al la Skolta Promeso: servi Dion, aliajn kaj sin mem. Ĝi estas kiel kompasa nadlo, kiu gvidas la ĝustan vojon, kaj la du steloj reprezentas la Skoltan Promeson kaj la Leĝon. La skolta trifolio estas sur blua fono kaj informas, ke la ĉielo ĉie estas la sama en la mondo. La tri petaloj de la trifolio reprezentas la tri partojn de la Skolta Promeso. La kompasa nadlo montras la ĝustan vojon, kaj la du steloj simbolas la Skoltan Promeson kaj la Leĝon. La dek pintoj de la du steloj (en lilio kaj trifolio) rememoras la dek punktojn de la skolta leĝo. Jen la Esperanta versio, kiu ŝanĝiĝas depende de la lando, lingvo aŭ religio kaj kiun ĉiuj skoltoj memvole deklamas:

- 1) skolto estas fidinda,
- 2) skolto estas lojala,
- 3) skolto devas esti utila kaj helpema,



- 4) skolto estas amiko al ĉiuj,
- 5) skolto estas ĝentila,
- 6) skolto estas amiko de bestoj,
- 7) skolto obeas ordonojn,
- 8) skolto ridas kaj fajfas malgraŭ malfacilaĵoj,
- 9) skolto estas ŝparema,
- 10) skolto pure pensas, parolas kaj agas.

Robert Baden-Powell estis surprizita de la rapideco,

kiel skoltismaj organizaĵoj komencis aperi en multaj landoj tra la mondo.



Aparteni al skoltisma organizaĵo antaŭenigas ampleksan disvolvigon per aventuro kaj media konscio, helpas formi daŭrajn amikecojn kaj akiri scion pri la mondo, kaj ankaŭ partoprenas en sociaj kaj civitanaj agadoj. Skoltismo emfazas sindoneman helpon por tiuj, kiuj bezonas helpon, volontuladon kaj komunuman servon.

En Esperantujo ankaŭ estas skolta movado. Ĝi estis fondita en la jaro 1918 de anglo, Alexander William Thomson kiel Skolta Esperantista

Ligo kaj nun Skolta Esperanto-Ligo (SEL).

La celoj de SEL estas:

1. Disvastigi skoltajn idealojn per Esperanto;
2. Disvastigi Esperanton inter la skoltaro;
3. Krei skoltan Esperantan literaturon;



4. Eldoni internacian skoltan revuon;

5. Solidarigi la senton de frateco, komunan en la skolta kaj Esperanto-movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

La anoj de SEL loĝas en la tuta mondo kaj do en pluraj landoj troviĝas sekcioj de la Ligo. Estas ankaŭ regule eldonata, en Esperanto, la revuo “La Skolta Mondo”.





Novaj eŭroj kun Maria Skłodowska-Curie, ĉu?



Eŭropa Centra Banko (ECB) estas la eldona banko de EŬRO, la komuna mono de la 20 membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio.

La banko situas en Frankfurturto ĉe Majno en Germanio. ECB planas novan serion de bankbiletoj, pli modernaj kaj multe pli bone sekurigaj. Iliaj gvidaj motivoj estas “eŭropa kulturo” kaj “riveroj kaj birdoj”.

Kadre de la “eŭropa kulturo” oni proponas elstarajn reprezentantojn de scienco kaj arto. Sur la bankbiletoj aperos:

- 5 € – Maria Callas (greka operkantistino),
- 10 € – Ludwig van Beethoven (germana komponisto),
- 20 € – Maria Skłodowska-Curie (pola-franca nobelpremiitino),
- 50 € – Miguel de Cervantes (hispana verkisto),
- 100 € – Leonardo da Vinci (itala pentristo, sciencisto, inventisto),
- 200 € – Bertha von Suttner (aŭstra pacistino, verkistino).

La projekto de la bankbileto de 20 eŭroj elvokis multe da polemikoj kaj diskutoj pro manko de polaj nomo kaj antaŭnomo de la nobelpremiitino. Proponitaj datumoj estis skribitaj france – Marie Curie. La eraron rimarkis unu el polaj ekonomistoj kaj poste ekinteresiĝis pri tio ankaŭ polaj eŭropaj parlamentanoj, kiuj jam komencis intervenan laboron. Des pli, ke la antaŭnomoj de la aliaj proponitaj reprezentantoj konservis sian originalan ortografion.

Maria Skłodowska-Curie estas pola heroino, kiu elvokas fieron al ĉiu polo. Ŝi ĉiam sentis sin polino, identiĝis kun Pollando, kaj

konservis fortajn ligojn kun sia lando. Ĉi tion klare montras ŝia elekto de la nomo “polonio”, honore al sia patrujo por la malkovrita kemia elemento.

Ŝi studis en Parizo, ĉar en Varsovio ŝi ne povis. Varsovio, ŝia naskiĝloko, je tiu tempo estis en la teritorio de la rusa dispartigo. La rusa aneksinto/uzurpulo ne permesis al virinoj edukiĝi. Forveturo al Francio ebligis al ŝi studi kaj disvolvi sciencan karieron. En Pollando tio estis neebla pro la socia kaj jura statuso de virinoj. En Parizo ŝi renkontis Pierre Curie, kun kiu ŝi edziniĝis kaj kun kiu ŝi faris mirindajn (trarompajn) esplorojn pri radioaktiveco.

Maria Skłodowska-Curie, unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la scienca mondo, estis polino. La franca traduko de la antaŭnomo kaj la manko de la pola parto de la nomo de la nobelpremiitino en la proponita bankbileto de 20 eŭro en Pollando vekas kontraŭdiron. La propono estas perceptata kiel malpliigo de ŝia pola heredaĵo kaj polaj radikoj kaj kontribuado al la erara konvinko, ke la sciencistino estis francino, sed ankaŭ repreno de merita loko de Pollando en la eŭropa komunumo.

Indas menci, ke simila situacio de manko de la plena pola skribo de la nomo de la sciencistino jam okazis. Ĝi koncernis EU-programon por junaj sciencistoj, kiu oni nomis “Marie Curie”. Daŭris jaron aprobo de la pola interveno, por ke la programo finfine ricevu la nomon “Maria Skłodowska-Curie Actions”.

Mi opinias, ke ankaŭ ĉi-foje la problemo estos pozitive solvita kaj la pola deveno de Maria Skłodowska-Curie, la dufoja Nobel-premiitino, ne plu estos dubinda.

Małgosia Komarnicka





Konatiĝu kun *Dasipeltis*, la ovo-manĝanto


Serpentoj estas konsiderataj ege danĝeraj bestoj. Kelkaj el ili estas venenaj, aliaj kapablas strangoli¹ kaj engluti la predojn².

Tiu, kiuj ne minacas homojn, estas danĝeraj por etaj bestoj. Kaj tamen... – la naturo plenas je surprizoj! Ekzistas specio de serpentoj, kiuj minacas neniu estajon! Ĝi nomiĝas en pluraj lingvoj *Dasipeltis* aŭ *Dasyptelis*.

Ekzistas pluraj subspecioj, divers-aspektaj. La plej disvastigata estas la griza Afrika Ovomanĝanto. Ĝi longas inter ĉirkaŭ 30 kaj 100 cm. Tiu milda kaj timema serpento ne havas dentojn. En la humidaj arbaregoj de Afriko, ĝi kutimas kaŝiĝi dum la tago kaj fariĝas aktiva kiam vesperiĝas. Ĝi nutras sin per etaj ovo de birdoj. Ĝi estas tre selektema kaj flaras la ovojn, ĉar tiamaniere ĝi kapablas diveni kiuj ovo estas fekunditaj kaj kiuj ne. La fekunditaj ovo estas tiuj, kiujn oni povas kovigi por ke birdidoj aperu el ili. Tiajn ovojn la serpento *Dasipeltis* evitas manĝi, ĉar ili malbonas por ĝia sano. Ĝi bezonas nur freŝajn krudajn ovojn, sufiĉe malgrandajn por ke ĝi povu engluti ilin. La vir-serpento *Dasipeltis* estas pli etaj kaj maldikaj ol la inoj, kaj bezonas manĝi tre etajn ovojn demetitajn de etaj birdoj. La inoj estas iom pli longaj kaj dikaj, kaj povas engluti iom pli grandajn ovojn,

kiel ekzemple tiujn de koturno, aĉetebajn en supermarktoj. La ordinaraj ovo de kokinoj estas tro grandaj eĉ por la inoj. La serpentoj *Dasipeltis* bezonas la ovojn nur krudajn kaj nepre nefrakasitajn.

Estas interesa la maniero laŭ kiu tia



serpento frakasas la ovojn, ĉar ĝi ne havas dentojn. Ĝia longa tre elasta gorĝo havas specialajn vertebrojn en la spino, per kiuj ĝi premas la ovon ĝis tiu frakasigas. Post kelka tempo, la serpento spitas la ovoŝelon. Tiu frakasado aktivigas la internajn muskolojn, kaj nur tiamaniere la serpento povas digesti la enhavon de la ovo iom post iom, malrapide.

Dum ĉirkaŭ unu semajno ĝi digestas unu solan ovon. Se oni donas al ĝi nur la flavon kaj la blankon de ovo, ĝi ne povas digesti tion, ĉar nur la ova frakasado aktivigas la intestojn.

Iuj homoj kreskigas tiajn serpentojn en siaj domoj, kiel dorlotbestojn. Oni metas ilin en vitrajn kestojn kun truitaj kovriloj, por ke ili havu aeron. Oni donas al ili branĉojn por grimpi kaj skatoletojn por kaŝiĝi, bovleton da akvo kaj, kompreneble, taŭgajn ovojn.

Kiam ili vidas nekonaton, ili ektimas kaj kaŝiĝas, kelkfoje frotas³ la skvamojn⁴ de la vosto, kaŭzante iun specon de sibilado. Sed ili estas sufiĉe inteligentaj por rekonu la homojn kiuj zorgas pri ili. Ili proksimiĝas al tiuj sen timo, eĉ grimpas sur ties manoj.

Luiza Carol





Algoj, valorigenda trezoro

Algoj havas la potencialon nutri nin kaj savi la klimaton. Jen la konkludo de studgrupo de Unuiĝintaj Nacioj. Ili povas anstataŭigi fosiliajn brulaĵojn kaj jam servas kiel bazo por diversaj esencaj produktoj.

Dum ili kreskas, ili konsumas CO₂ kaj produktas oksigenon. Ilia kresko estas la plej rapida el iu ajn alia organismo sur la Tero. Pluraj specioj estas manĝeblaj, sed ili luktas por akiri spacon en niaj manĝkutimoj. Bedaŭrinde! Ni devas malkovri ilian guston kaj konsumi ilin!

Laŭ la marbordo de Norvegio ekzistas alg-produktejoj, promesplena industrio. Algoj kreskas same bone en mara akvo sala, kiel en lagoj kun malsala akvo, depende de la algospecio.

Japanoj nomas ilin marherboj kaj uzas ilin ofte, ekzemple por prepari *makizushi*, kie la algo ĉirkaŭas la rizajon.

Mireille Grosjean

(Laŭ *Das Magazin* N-ro 35, 2025)

Stulta ideo




En la jaro 2017 okazis tute sude de Sud-Koreio ILEI-Kongreso, sukcesa kunveno kun pli ol 300 partoprenantoj. Sekvis UK en Seulo, la ĉefurbo. Kompreneble multaj partoprenantoj de la ILEI-Kongreso volis ankaŭ partopreni UK-on. Do la organizantoj mendis buson, aŭ busojn, kaj en kvar horoj ni atingis la urbegon Seulo norde de la lando.

Survoje mi konstatis, sidante tute antaŭe en la buso, ke la ŝoforo enŝaltas la glac-viŝilojn. Mia stulta ideo estis: pluvas. Mi rigardis eksteren kaj vidis multajn piedirantojn, kiuj paŝis sen uzi pluvombreton. Do NE pluvis. Tamen la antaŭa glaco de la buso estis malseka: gutoj ĝenis la vidadon por la stiristo. Stranga afero...

Mi devis digesti tian fenomenon, tio estas profunde pripensi. Fakto estas, ke nia buso estis agrable malvarma per klimatizilo. Ekstere en somera klimato orientazia la aero estis ekstreme humida. Tia vetero regas de Julio al Septembro en Ĉinio, Koreio, Japanio. Kio okazis?

La varma kaj humida aero kolizias kun la malvarma antaŭa fenestro de la buso, kaj la gasforma akvo de la humida aero likviĝas formante gutojn, ĝi kondensiĝas. Tiam la ŝoforo bezonis purigi sian ventosirmilon por klare vidi. Tiu fenomeno similas al roso.

Mireille Grosjean





Virina Agado

Ĉina Esperanto-studentino kaj retkomerca platformo

Mi estas tria-jara studentino de la Esperanto-fako ĉe Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio.

Mi tre ŝatas mian fakon kaj mi volas kontribui al la evoluo de Esperanto. Do, kiel mi povus fari tion? Eĉ por studentoj de la fako ne estas facile trovi laboron rekte kunligitan kun nia lingvo. Sed ni ĉiuj estas kreemaj kaj kuraĝaj junuloj. En tiu ĉi artikolo mi rakontas al vi la manieron, kiun mi mem trovis por daŭre uzi kaj propagandi Esperanton kaj samtempe gajni iom da mono.

Retkomerco nun estas iĝanta pli kaj pli populara ankaŭ en aliaj partoj de la mondo. Sed certe en Ĉinio interreta aĉetado aparte furoras. Diversaj produktoj, ligitaj al dudimensiaj animaciaj, estas tre popularaj kaj mi kaptis tiun ŝancon.

Por gajni iom da mono, vastigi mian propran kolekton kaj malfermi kanalon por propagandi Esperanton, mi malfermis retbutikon ĉe Pinduoduo, kiu specialigas pri vendado de animaciaj kartoj.

Pinduoduo estas e-komerca apo kaj eble eŭropaj legantoj konas ĝian internacian version.

En Germanio, ĝi nomiĝas *Duoduo International*, ankaŭ konata kiel *Temu*. La eksterlanda versio fokusiĝas pri virinaj vestaĵoj kaj juveloj de mezalta al malalta gamo. Ĝia merkata strategio, simila al tiu



por hejmaj malaltprezaj produktoj, celas malmultekostajn kaj rapidajn vendojn. Mi ŝatus scii, ĉu vi uzas *Temu* kaj ŝatas ĝiajn diversajn merkatajn agadojn.

En mia Pinduoduo-butiko mi mane pakas kaj hazarde kunmetas kartojn de la karakteroj plej ŝatataj de la klientoj. La delikataj pakaĵoj enhavas multe da malgrandaj donacoj.

La vendejo havas ankaŭ diversajn rabatojn, kiel ekzemple por Nigra Vendredo (*Black Friday*) aŭ Kibernetika Lundo (*Cyber Monday*), kiuj multe pliigas la deziron de homoj aĉeti.

En la pasintaj monatoj multaj konsumantoj en Ĉinio ŝatis mian butikon. Samtempe, mi ne forgesas varbadi pri nia lingvo.



Dum la pakado de la kartoj, mi ĉiam enmetas kelkajn donacetojn, rilatajn al Esperanto, kiel kartojn kun enkonduko al Esperanto, malgrandajn Esperanto-insignojn, kartojn kun la verda stelo kaj de lernejoj, kie la lingvo estas instruata. La celataj klientoj de mia vendejo estas ĉefe lernantoj de bazlernejoj kaj mezlernejoj,

kio estas bona aĝo por eklerni Esperanton, aŭ almenaŭ por interesiĝi pri ĝi. Tiel la ideo de nia lingvo ligiĝas en ilia kapo al ŝatata animacia karaktero, kreante tre allogan kunmeton, pri kiu ili povas ankaŭ paroli kun siaj samaĝuloj dum ludado.

La merkato de elektronika komerco daŭre vastiĝas en aliaj partoj de la mondo. Ekzemple, la volumo de interretaj transakcioj en Germanio en 2024 estas antaŭvidita superi la 86,7 miliardojn da eŭroj, kiujn ĝi atingis en 2021, markante novan rekordon por la germana elektronika merkato. Interreta butikumado plene integriĝis al la ĉiutaga vivo. Do, mi vere ŝatus atingi la germanan kaj aliajn publikojn per mia reĉbutiko.

Mi antaŭĝojas utiligi la disvolvon de elektronika komerco por helpi disvastigi nian lingvon ĉie. La produktoj en la vendejo povas esti ne nur kartoj, sed ankaŭ aliaj produktoj laŭ la lokaj deziroj. Mi daŭre plibonigos ĝin por montri, ke per Esperanto oni povas fari veran komercon kaj samtempe porti la mesaĝon de la internacia lingvo al pli da junuloj.

Karmina <shaotong111@qq.com>



La gestudentoj de la Esperanto-fako kun koreaj gastoj en Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio. Centre estas Karmina.



Survoje al Esperanto

Ĉu vi sciis, ke... en Pollando oni efektive povas “vojaĝi kun Esperanto”?

Multnombraj bildoj de verda tramo kun la vorto “Esperanto”, skribita sur ĝi, cirkulas rete: eleganta, futura, tute kredinda. Sed... – surprizo! Tiu tramo ne ekzistas. Ĝi estas bildigo, kreita per artefarita inteligenteco, malgranda vida mito, kiu disvastiĝis inter ŝatantoj de la universala lingvo. Tamen, en Pollando, Esperanto vere vojaĝas – nur sur tre malsamaj radoj kaj reloj.

Varsovio havas Esperanto-bushaltejon!

Jes, ĝi estas vera: “Esperanto” estas la nomo de haltejo sur la linio 01 de Varsovio. Ĝi situas en la nordokcidenta kvartalo, proksime al la juda tombejo Okopowa, unu el la plej grandaj en Eŭropo. Kaj ĝuste tie, nur kelkajn paŝojn for, ripozas Ludwik Lejzer Zamenhof, la kuracisto kaj lingvisto, kiu inventis la internacian lingvon Esperanto en 1887. Hodiaŭ, dekoj da urbaj busoj preterpasas lian tombon ĉiutage. Loko, kie la rutino de navedantoj* renkontas pecon de monda historio.




Interesa fakto: la finstacio nomiĝas “Esperanto”, kaj aliaj linioj, kiel ekzemple 111 kaj 157, foriras aŭ alvenas de tie. Estas kvazaŭ Varsovio dediĉis haltejon al la lingva espero de antaŭ jarcento.

Trajno, nomata “ESPERANTO”!

Ne temas pri fantazio: la horaro de la PKP Intercity-trajno montras la trajnon IC 1002 ESPERANTO. Ĝi foriras de Łódź Fabryczna (je la 8:07 atm), trapasas Varsovion, kaj alvenas en Białystok ĉirkaŭ la 10:50 atm. La itinero ne estas hazarda: Białystok estas la naskiĝloko de Zamenhof, kaj la trajno portas lian nomon ĉiutage, simbole unuigante la lokojn de lia vivo. Lingva scivolemo: la nomo “Esperanto” ankaŭ estis elektita danke al reta voĉdonado inter esperantistoj kaj polaj entuziasmoj. La iniciato celis doni al la trajnoj nomojn, kiuj festas la kulturon kaj historion de la lando. La rezulto? Esperanto oficiale eniris la trajnhoraron, kun biletoj aĉeteblaj ĉe PKP aŭ Koleo.

Stasia Chylicki





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
la gvidantino
de Esperanto-klubo
“Betuleto”, Rusio.
lena_espero@mail.ru



Intervjuo kun Esu Peranto

En la pasinta numero de *Juna Amiko* en la rubriko *Interkultura Mondo* ni skribis pri Artefarita Inteljekto (AI). Ekzistas multaj kialoj por prezenti specialan gaston, kiu okupiĝas pri AI, kiu estas pli kaj pli ĉeestanta en nia vivo kaj kiu pli kaj pli multe influas ĝin.

Artefarita Inteljekto ludas ŝlosilan rolon en multaj kampoj kaj por pli bone kompreni tiun rolon, kaj precipe ĝian potencialon, Małgosia Komarnicka interparolis kun Esu Peranto. Li estas modesta persono, kiu difinas sin nur kiel ordinaran uzanton — ne fakulon, li kreas afiŝojn spontanee, laŭ momento, scio kaj sento, kaj publikigas ilin en Fejsbuko, por kontribui al la bono de la Esperanto-movado, permesante al ĉiuj libere uzi liajn kreaĵojn por la komuna bono de Esperanto. Vizitu lian fejsbukan paĝaron <https://www.facebook.com/groups/2204470288/user/100000018334429> por admiri liajn ilustraĵojn.

MK: Kio estas Artefarita Inteljekto? Ĉu eblas klare, sed mallonge respondi tiun demandon?

EP: Artefarita Inteljekto estas komputila programo, kreita de homoj. Ĝi povas lerni, rekoni bildojn, kompreni tekstojn kaj



proponi ideojn. Oni povas imagi ĝin kiel tre rapidan lernanton, kiu helpas — sed ne anstataŭas — la homon.

MK: Kiom longe vi jam laboras kun ĝi?

EP: Mi uzas AI jam de kelkaj jaroj. Komence mi eksperimentis pro scivolemo, sed poste mi rimarkis, ke ĝi vere povas helpi verki, traduki, desegni kaj instrui. Ĉiu nova projekto montras al mi ion neatenditan — kaj ofte tre amuzan.

MK: Kiel AI lernas?

EP: Ĝi lernas el grandaj kolektoj da tekstoj, bildoj kaj ekzemploj. Per specialaj algoritmoj ĝi rekonas ŝablonojn kaj kunligas informojn. Ĝi ne havas emociojn, sed kapablas krei novajn ideojn surbaze de tio, kion ĝi jam konas.

MK: Rakontu iom pri praktikaj aplikoj de AI!

EP: AI jam helpas en multaj kampoj, inter alie en: edukado, tradukado, medicino, muziko kaj arto. Ĝi povas traduki, analizi bildojn, komponi melodiojn aŭ helpi plani. Danke al ĝi, homoj povas pli koncentriĝi je la kreiva parto de sia laboro.

MK: Kiel AI influas la kreaĵon procezon?

EP: Por mi, AI estas kvazaŭ kunverkanto. Ĝi proponas skizojn, ideojn, kolorojn kaj vortojn. Mi elektas tion, kio plej taŭgas al mia stilo, kaj aldonas la homan tuŝon. AI ne anstataŭas min — ĝi nur malfermas novajn pordojn al inspiro.

MK: Kiel AI traktas erarojn?

EP: AI ankaŭ eraras. Foje ĝi miskomprenas aŭ tro simpligas aferojn. Sed kiam oni montras al ĝi la ĝustan vojon, ĝi lernas. Tio memorigas nin, ke eraroj estas parto de lernado — por maŝinoj simile kiel por homoj.

MK: Kaj kiaj etikaj defioj?

EP: Uzi AI postulas respondecon. Ni devas zorgi pri privateco, justeco kaj vero. AI ne havas konsciencon, do homoj devas decidi, kiel uzi ĝin por bono, ne por trompo aŭ maljusteco.





MK: Kiel bone demandi AI-on?

EP: Demandu klare kaj simple. Se vi aldonas ekzemplon aŭ difinas la stilon (ekz. rakonta, poezia, scienca), AI pli bone vin komprenos. Unu preciza demando ofte valoras pli ol longa teksto. Bona demando estas kiel ŝlosilo al bona respondo. Petu AI, kiel demandi por ricevi la plej bonan respondon.

MK: Kiom da tempo oni bezonas por krei afiŝojn kun AI?

EP: Por simpla afiŝo kun teksto kaj bildo ofte sufiĉas kelkaj minutoj. Sed se vi volas, ke ĝi estu vere arta kaj adaptita, necesas pacienco. Eksperimentu, ĝis la rezulto sentblas vere via.

MK: Kia estas la estonteco de AI?

EP: AI fariĝos tiel kutima ilo kiel telefono aŭ komputilo. Ĝi helpas nin lerni, esplori, krei kaj eĉ protekti la medion. Sed plej grave estas, ke ni restu homoj — kun koro, scivolemo kaj empatio.

MK: Ĉu kun AI vi preparus „ion” speciale por niaj legantoj?


EP: Mi aldonas intence kreitan ilustraĵon, kiu laŭ mi bone kaptas la etoson de la intervjuo (la lasta bildo).

MK: O, jes... Koran dankon pro la ĝojiga ilustraĵo. Kiu estas Aida, via asistanto?

EP: Aida estas mia voĉo en la mondo de AI. Ŝi helpas ordigi ideojn, klarigi pensojn kaj inspiri novajn. Ŝi estas ilo, kiu faciligas la procezojn kaj permesas al mi koncentriĝi pri kreado.

MK: Dankon Esu Peranto pro viaj sinceraj respondoj – kaj mi deziras al vi multe da sano kaj plenumiĝon de viaj revoj. Se ni bone uzos Artefaritan Intellekton, ĝi povas doni multajn profitojn. Ĝi ne anstataŭigos la homon, sed ĝi povas plenumi liajn multajn taskojn pli efike. Certajn agadojn realigos pli rapidaj kaj pli precizaj projektoj, kaj ĝia celo ne estas konkurenco, sed partnereco.

Małgosia Komarnicka





Komisiono por Virina Agado

Anna Elisa Tuschinski

En Esperantujo, jam ekde ĝia plej frua historio, esperantistinoj plenumis gravan rolon konstruante la Esperanto-movadon.

La unua estis Klara Zamenhof, ĉiama kunlaborantino kaj helpantino de sia edzo. Ankaŭ Lidia Zamenhof, la filino de gesinjoroj Zamenhof laboris por la bono de Esperanto. Tiuj du pionirinoj de la Esperanto-Movado jam estis prezentitaj en nia revuo *Juna Amiko*.

Nun mi proponas tralegi informojn pri alia, ankaŭ grava pionirino, pri Anna Elisa Tuschinski, nomata fare de ŝiaj nuntempuloj “Esperanto-Patrineto”.

Anna Elisa Tuschinski naskiĝis la 4-an de decembro 1841 en Gdańsk (kiu tiam estis parto de la Reĝlando Prusio). Ŝi estis filino de la germana komercisto, Gustav Lorwein kaj polino, Adela Juchnowicz.

Profesie ŝi estis instruistino kaj instruis en lernejoj en Gdańsk, en urbkvartalo



Anna Elisa Tuschinski
en la jaro 1870 en Vieno.

Wrzeszcz. Ŝi geedziĝis kun la komercisto Karol Tuschinski, kun kiu ŝi havis filinon. Ĉirkaŭ 1890 ŝi estis vidvino.

Kiam ŝi estis pli ol 60-jara, ŝi trovis broŝuron por lerni Esperanton “Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro”. Ŝi estis ravita per tio, ke la lingvo estas tre logika kaj rapide mem lernis ĝin. Ŝi komencis organizi lingvajn kursojn de Esperanto, instrui kaj popularigi ĝin. Esperanto fariĝis ŝia vivpasio. Ŝi estis nekontestbla pionirino de la Esperanto-Movado en Gdańsk (tiam Danzig). En novembro 1907, en la aĝo de 66 jaroj, ŝi fondis la unuan Gdańsk Esperanto-Societon (“Danziger Esperanto Verein”), kiu rapide komencis disvolviĝi kaj aktive funkcii. Ĝis 1910 ĝi havis pli ol 100 membrojn.

Danke al ŝia klopodo, de la 22-a de Julio ĝis la 1-a de Aŭgusto 1912, estis organizita en Gdańsk kaj Sopot la 7-a Germana Esperanto-Kongreso. La unua mondmilito bremsis la agadon de Anna Tuschinski,



Anna Elisa Tuschinski, konata kiel
“Esperanto-Patrineto”, 1931 en Vieno.



sed post la milito ŝiaj klopodoj faris plian disvolviĝon de la lingvo Esperanto. En 1920, proksimume 130 lernantoj lernis Esperanton en Gdańsk. Ĝi estis instruita en ses klasoj. Du jarojn poste, en 1922, kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio, Anna Tuschinski organizis la Gdańskan Kongreson de Esperantistoj. En ĝi partoprenis 150 esperantistoj, inkluzive de eksterlandaj gastoj. Unu el la gravaj gastoj estis Klara Zamenhof. La Esperanto-Movado disvolviĝis tre bone en Gdańsk. En 1924, dum la 2-a Internacia Gdańsk Foiro (*Danziger Messe*), la urbodomo unuafoje eldonis informmaterialojn ankaŭ en Esperanto.

La kunlaboro de Tuschinski kun Universala Esperanto-Asocio vekis ŝian esperon organizi internacian kongreson en Gdańsk. Ŝia revo realiĝis en 1927. La 19-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Gdańsk kaj Sopot. Ĝi estis unu el la plej gravaj kaj plej grandaj okazaĵoj de la intermilita periodo. Pli ol 920 personoj el 40 diversaj landoj partoprenis en ĝi. Anna jam havis 86 jarojn kaj, kiel Honora Prezidantino de la Kongreso, ŝi faris la malferman paroladon.

La kongreso estis perfekte preparita. Estis eldonitaj 22 memorbildkartoj kaj specialaj eldonaĵoj, oni preparis ankaŭ multajn materialojn kiel afiŝojn. Ĝuste en Gdańsk estis establita en 1927 la “Esperanta Librotago”. Ĝi estas festata ĝis hodiaŭ, la 15-an de Decembro. Feliks Zamenhof, la frato de Ludoviko Zamenhof, proponis fondi la unuan Esperanto-Muzeon. La propono estis akceptita kaj du jarojn poste ĝi estis efektivigita. La muzeo estis fondita en Vieno. Dum la kongreso la 31-an de Julio, okaze de la 40-a datreveno de la kreo de la internacia lingvo Esperanto, en maldensejo *Dolina Echa* (Eĥa Valo) estis ceremonie plantita la “Jubilea Kverko”. La kverkaj radikoj estis kovritaj per grundo, alportita el diversaj landoj. Proksime de la kverko estis lokita roko kaj vojmontrilo “Esperanto-Vojo”.

Sur la marmora tabulo, alkroĉita al la roko, estis surskribo en du lingvoj: Esperante kaj germane, kiu informis pri la kongreso kaj la plantita kverko.

Anna Tuschinski akiris meritoplanan rekonon en la internacia Esperanto-Movado – oni nomis ŝin “Esperanto Patrinetto”, sed ŝi estis ankaŭ vaste respektata en Gdańsk. Lokaj gazetoj skribis pri ŝia naskiĝtago.

La dua mondmilito estis sekva granda defio por Anna Tuschinski kaj ankaŭ por multaj esperantistoj. Grandega bato estis la dehakado de la “Jubilea Kverko” kaj la frakasado de la memortabulo fare de la nazioj en la nokto de la 12-a/13-a de Novembro 1938.

Anna Tuschinski okupiĝis pri la Esperanto-Movado ĝis la fino de sia vivo kaj ŝi restis fidela al la ideoj de la lingvo Esperanto. Ŝi mortis la 9-an de Oktobro 1939 en okupata de nazioj Gdańsk, en la aĝo de 98 jaroj.

En 2020 ŝi estis proponita kiel la patronino de unu el la tramoj en Gdańsk. Estas la iniciato de tiu ĉi urbo nomi tramojn laŭ la plej eminentaj Gdańsk-personoj. En 2023, ŝia vivo estis montrita en du-minuta dokumenta filmo “Wrzeszczanki”.

Anna Elisa Tuschinski estas ne nur pionirino de la Esperanto-Movado en Gdańsk, instruistino, fondintino de la unua Gdańsk-Esperanto-Societo, nomata “Esperanto Patrinetto”, sed ankaŭ ŝi estas bela ekzemplo de virina forto kaj saĝeco.

Małgosia Komarnicka





Tiĉino



Tiun itallingvan parton de Svislando oni atingas, kiam oni traveturas Alpojn tra la fama Gotarda Tunelo, la plej longa tunelo por trajnoj en la mondo (58 km).

Indas viziti la urbon Lokarno ĉe la Majora Lago *Lago Maggiore*, kiu etendiĝas en Svislando kaj en Italio sude de Alpoj. La surfaco de tiu lago estas la plej malalta punkto en Svislando: 190 m. super marnivelo, kaj la grundo de tiu lago situas sub la marnivelo, tiom krutaj la bordaj montoj estas, tiom profunda ĝi estas. En Lokarno estas granda placo, kie okazas ĉiun jaron filmfestivalo mondscale konata.

De la urbo Lokarno oni povas iri per ŝipo al la insulo de Brissago, kiu entenas parkojn kun multaj raraj plantoj. La sezono printempa estas favora momento por vidi multajn florojn.

El Lokarno oni povas uzi buson por atingi *Monte Verità* (Monto Vero), la fama loko super la vilaĝo Losone. Tie kunvenis artista grupo, vivreforma movado, fine de la deknaŭa jarcento, kaj evoluis ekde 1900 komunumo iom kreema, iom anarkiista, iom avangarda, iom nudista, iom dancema,



iom vegetarana... Ĉiĉerono rakontas al la scivolemaj vizitantoj pri tiu bolanta epoko de *Monte Verità*, kien multaj famuloj venis, restadis, verkis, diskutis, inventis, feris... Richard Strauss, Paul Klee, Konrad Adenauer, Carl Gustav Jung, Lenin, Isadora Duncan, ... (vidu longan liston en pria artikolo en Esperanto-Vikipedio). Nun la domaro apartenas al la kantonon Tiĉino kaj al la Politeknika Altlernejo de Zuriko. Okazadas en tiu belega loko seminarioj kaj diversspecaj kunvenoj. Estas tie hotelo, salonoj, restoracio, parko, muzeo kaj belega elvido al la lago. Tra Monto Ceneri oni atingas alian ĉelagan urbon Lugano. Temas pri belega urbo inter Monto Bré kaj Monto Salvatore. La lago de Lugano ankaŭ estas parte svisa, parte itala.

Tamen la ĉefurbo de la kantonon estas nek Lokarno nek Lugano, sed Bellinzona, mezepoka urbo sen lago. Tri kasteloj ornamas la urbon, unu el ili, Castelgrande (Granda Kastelo), estas vizitebla kaj vizitinda. Ĝi situas meze de la urbo sur monteto, tamen oni provizis ĝin per lifto.

Mireille Grosjean



Rakonto pri du urboj



La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



**Ne temas pri la famaj urboj
Londono kaj Parizo en la verko
de la angla verkisto Charles
Dickens.**

Temas pri du urboj en Centra Eŭropo. Iliaj nomoj ambaŭ komenciĝas per la litero B. Tra ambaŭ fluas la majesta rivero Danubo kaj ambaŭ havas imponajn monumentojn. Kaj ili ambaŭ organizis Universalan Kongreson (UK). Ĉu vi divenis pri kiuj duurboj temas?

Jes, nia hodiaŭa rakonto temas pri Budapeŝto en Hungario kaj Beogrado en Serbio. Beogrado gastigis la UK-on en 1973 kaj Budapeŝto en 1983.

Via nuna verkisto partoprenis en ambaŭ kongresoj. Ambaŭ urboj havis Esperanto-oficejojn. En Beogrado temis pri tiu en strato Terazije 42, en Budapeŝto dum pluraj jaroj en strato Thokoly. Jen du urboj kun la nomo komenciĝonta per la litero B, kun oficejoj en stratoj komenciĝantaj per la litero T. – Kia koincido!

Kial mi elektis verki pri ĝuste tiuj du urboj? Multaj legantoj scias, ke mi amas trajnojn kaj la fervojojn. Lastatempe mi legis, ke trajnservo inter la du urboj povos forte boniĝi. En Serbio oni laboregis pri la



bonigo de la linio inter la urboj Novi Sad kaj Subotica, landlime al Hungario. Mi memoras, kiam tiu linio estis katastrofe malbona, la reloj estis malrektaj kaj malparalelaj. Kiel nov-zelandano dirus: "Ili estis tiom malrektaj, kiom la malantaŭa kruro de hundo!"

Pro la malbona trak-stato, trajnoj estis limigitaj al 40 km/hore. Do, vojaĝo de Beogrado al Budapeŝto daŭris ok horojn. Mi nun legis, ke la serba fervojo radikale bonigis la linion, tiel, ke trajnoj povos veturi tie je 200 km/hore. Tio permesos la vojaĝon inter la du ĉefurboj de nur ĉ. 5 horoj.

La lasta bonigo okazos baldaŭ. La tuta linio estas elektrizita en ambaŭ landoj, escepte de la 20-kilometra trans-lima parteto inter Subotica kaj Kelebia en Hungario. Tiun peceton oni elektrizos, por ke la tuta vojaĝo inter Serbio kaj Hungario estos farebla per elektraj lokomotivoj. Tiuj estas multe pli efikaj ol poluaj dizelaj lokomotivoj. Resume, tre pozitiva rezulto!



Vort-klarigoj: *Koincido:* neatendita sameco inter du faktoj. *Radikale:* forte, draste. *Elektrizita:* provizita per elektro. *Trans-lima:* iranta de unu lando al la najbara lando. *Poluaj:* malpurigaj.



Unu el la kvar



Respondoj al la demandoj el la pasinta numero:

1. La lando, kiu havas limon kun Andoro, estas Hispanio.
2. Detruis duonon de Romo en A.D. 64 fajro (dum kiu imperiestro Nero violonludis, laŭdire).
3. Lando, kiu randas nur unu alian estas Portugalio: ĝi randas al Hispanio.
4. Dinosauŭo estas reptilio.
5. La du koloroj de la nacia flago de Aŭstrio estas ruĝa kaj blanka.
6. Poliglotoj ĉefe majstras pri lingvoj – ili kapablas paroli plurajn.
7. Ne havas flugilojn delfeno.
8. Okazas printempo en la norda hemisfero en Aprilo: se klimata ŝanĝo ne intervenas.
9. La linio duonvoje de la norda poluso kaj la ekvatoro estas la Tropiko de Kancero.
10. En ĉambro tenas egalecan temperaturo termostato.
11. Alia nomo por milda trablovo estas zefiro.
12. Oni dissendas Radio Vatikana el Romo.



Krucenigmo

La solvon bv. sendi al:
redakcio@gmail.com.

Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos donace la verkon

“107 krucenigmoj en Esperanto” de Stano Marček.



	LA UNUA KASITA PROVERBO	FINAJO DE SUB-STANTIVO		LAND-KODO DE BANGLADEŜO	RELIGIA ĈEBE-MONJAR'	OKUP', PROFESI'	LA DUA KASITA PROVERBO
DISTRIBUA PREPOZICIO			ORNAMA JUVE'				
SIMBOLO DE OKSIGENO		INSPIRI PLAIN SENTOIN BRILA GLOBETO					
RESPOND-KUPONO				MONTRA PRONOMO			
KOMENCI NE ESTI					KALI-FORNIO		
PAŜADI					RILATA AL EU-LANDO		
OST' EN ANTAU-BRAKO				ALTA KONSTRUAJ PIED-VEST'		NULO	EKSRE-MENTA LUKVAJO
NOMO DE LA 7-A LITERO			PORTATA PEZAJ GRANDA VESP'				
SIMBOLO DE AMPERO		RILATA AL HINDA LABORISTO ALTA TAKS'					
MALOFTA (RADIKO)				KLINK' VIRSEKSA PRONOMO			
DIAFANA JUVEL-STON'					FUTURA FINAJO		
ELEMENTO (E)					ACD-ORGANO		VERBA FINAJO ELUZI ELFROTI
PART' DE SANGO				DENOVA PREFIKSO ĈE PARENCOJ			
LAND-KODO DE TANZANIO			ĈEFURB' DE SVISIO AKVO-FERMILO				
ADJEKTIVA FINAJO		GRANDEG-UI' MOVOS AL SI					
STRATO (MLL.)				POEMO			
SINSEKV' DE MAL-AGRAJAJ VOKALOJ				SIMB. DE TANTALO		SIMB. DE RIDO	
PLIBELIGAJ'						MUTA ARTIST'	
SUMAKO, VENENA ARBO				PLAN-LINGVO			TUNO
SIMBOLO DE OSMIO			FINO DE PREGO	LA SESA TONO			PREPO-ZICIO




Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen; *financo@fel.esperanto.be*. **Brazilio:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, 483 Green Lanes, London, N13 4BS; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 319, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉeĥio:** Jana Zigal, *peranto@esperanto.cz*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Saïd Balouchi, *said.balouchi@esperanto-france.org*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsafia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** József Németh, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *esperoenparmo2020@yahoo.com*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Koreio:** 464 Ho, Toegye-ro 217, Jung-gu Seoul, KR-04558, Republic of Korea, Korea Esperanto-Asocio, K-filio de ILEI, *www.esperanto.or.kr*, *kea@saluton.net*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Vífazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@gmail.com*. **Usono:** Esperanto-USA, 2014 Capitol Ave #100, Sacramento CA 95811; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*.

Mendojn eblas sendi ankaŭ al *ilei.abonoj@gmail.com*.

PILĈJO



Rapidu formiketoj!
Prenu ĉiujn folietojn,
por ke la parko estu
malfermita tuj!



Belegas
la parko.

Ni nur devas
forĵeti
rubĵojn.



Jen tiuj
ĉi idoj!

Iliaj gepatroj devas
troviĝi proksime...



... sed la birdidoj ne
povas resti ĉi tie.

Jen ideo.



Hundeto, kio okazas?



Hundeto,
ne estas
momento
por ludi.

Pilĉjo, via hundo estas
tre inteligenta.



Geknaboj,
kunportu
ĉiujn ilojn!
Mi prenos
segilon kaj
martelon.



Iom pli
poste...

Hundeto, mi
gratulas vin
pro via ideo!